

Zagreba Esperantisto

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ՀոնհանՅԱԿ
ՅԵՐՈՅԵՆԻՐԱՅԱԿՈՍԻԱ

Ĉi-numere legu pri:

**LA DUA ROMANO DE MATO LOVRAK
EN ESPERANTO**

**BULGARA ESPERANTO-KONGRESO
EN RUSE**

**EUROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ
KANTOJ EN VROCLAVO**

ORNITOLOGIA RIĈAĴO DE KROATIO

1

2015

Infanoj-illustristoj en Veliki Grdevac
Fotis: Franjo Forjan

2015/05/27

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

DEC, Bana Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
dec.kroatio@gmail.com
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Tiskara Horvat, Bjelovar

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

**Pagebla al konto de
Dokumenta Esperanto-Centro:**

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

Karaj legantoj, antaŭ vi estas nia nova, sed iom kontraŭdira numero. Unuflanke ĝi raportas pri evidentaj sukcesoj kaj kvalite realigitaj projektoj, kaj aliflanke pri la negativaj tendencoj kaj kaŝataj sekretoj, kiuj nur amarigas la laboron kaj malebligas kunlaboron. La redaktoroj prave demandas sin kie estas la limo inter vera ĵurnalismo kaj skandalismo. Ĵurnalismo ja devas esti libera de katenoj, ĝi devas havi la rajton kaj respondecon informi pri ĉio, anstataŭ manipuli per informoj, senkonsidere ĉu ili estas pozitivaj aŭ negativaj. Jam en la komenco nia gazeto akceptis la principon de malfermiteco al siaj legantoj kaj ĝi daŭre sekvas tiun vojon. Longe la movada praktiko estis manipuli per informoj. Multfoje ni surpriziĝas eksciinte ion gravan, kion neniu volis malkaŝi publike. Eble el tia ekscio sekvas nia miskonkludo, sed se io estas kaŝata antaŭ la membraro, devas ekzisti forta argumento por tio. Faktoj, kelkfoje dismetitaj diversloke, havas sian sencon nur kiam el ili oni kreas "mozaikan bildon".

En la aktuala numero vi legos pri la 67-a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio, el kies spertoj ankaŭ kroataj esperantistoj povus ion lerni. Oni povas lerni ankaŭ el la bona praktiko de la pola movado, celanta eliri el la "verda getto" per serioza malfermo al neesperantista publiko, kion oni sukcesas per festivalo de Esperantaj kantoj. Ĝojigas la fakto, ke sur tiu vojo ankaŭ kroataj esperantistoj helpis per sia partopreno.

La enlanda praktiko de Kroatio konfirmas la tezon, ke la ekstera mondo ne estas malamika al esperantistoj, se ili montriĝas normalaj kunlaborantoj anstataŭ fanatikaj stranguloj. Unu pozitiva ekzemplo estas la ĉi-jara eldono de la romano "La trajno en la neĝo" de Mato Lovrak, kiu en la regionaj kadroj sukcesis ricevi ĉiaspecan subtenon kaj kunlaboron. Tio des pli gravas en la momento, kiam evidente la malnova sistemo de financado de niaj projektoj pere de Ministerio pri kulturo (alivorte per ŝtata mono) perdas sian intensecon. Se niaj societoj volas travivi la ŝanĝojn, ili devas trovi novajn fontojn, kaj en tiu serĉado ili devas esti pretaj adaptiĝi al la nova Leĝo pri asocioj, kaj eventuale ankaŭ pagadi impostojn.

Se io krom la problemoj de financado de niaj aktivecoj estas rimarkebla, certe temas pri intensiviginta eldona aktiveco en Kroatio. Dum kelkaj pasintaj monatoj aperis pluraj novaj titoloj, altkvalitaj el teknika vidpunkto. Sed pli ol tiu kvalita salto ĝojigas la sistema planado de novajn eldonoj, pri kiuj ni ne plu timas paroli publike.

Inter multaj ĉi-numeraj Esperantaj temoj unu ne-Esperanta estas aparte akcentinda. Nia pola kunlaboranto esploris la birdojn de Kroatio kaj tiel riĉigis nian ornitologian terminologion.

Guante jam plenpulme la someron, ni deziras al vi agrablan legadon.

LA ŜIPO DAŬRE KAJ SENHALTE SINKAS

 Radenko Milošević

*Negativaj tendencoj en la kroata Esperanto-movado
ricevas novajn dimensiojn.*

LA "PROFETAĴO" EL 2011

Kvankam dotitaj per memorkapablo, en multaj situacioj homoj forgesas ĝin uzi: *hazarde*, pro malnoviĝo aŭ malaktualiĝo de la afero aŭ *intence* puŝante ilin en forgeson. Pro la unua kialo mi forgesis la eventojn, okazintajn en Kroata Esperanto-Ligo (KEL) antaŭ nur du-tri jaroj, sed ili revenis en mian memoron pro la papermonto sur mia skribotablo. En tiu momento mi komprenis, ke ankaŭ multaj aliaj nialandaj esperantistoj forgesis tiun epizodon. Tiuj, kiuj kaŭzis ĝin, forgesis ĝin *intence*, kaj la aliaj dronas en *hazarda* nescio kaj neinformiteco. Kaj ĉi-momente mi komprenas la gravan aferon: *se jam post du-tri jaroj la aferoj estas forgesataj, kian opinion pri la menciita epizodo havos niaj posteuloj?* Do, mi decidis ankoraŭfoje priskribi ĝin, kvankam mi jam faris tion en la artikolo "Jarkunveno de KEL: venko de demokratio?" (ZE 2/2013). Tiu artikolo donas mian vidpunkton pri la afero, sed intertempe daŭras "malvarmaj" rilatoj inter KEL kaj ĝiaj oponentoj, kiuj plue dronigas la komunan ŝipon de Esperanto en Kroatio.


La 1-an de novembro 2011, *Josip Pleadin*, tiama estrarano de KEL, sendis al siaj kolegoj en la Estraro retmesaĝon titolitan "La jaro 2014", esprimante sian opinion

pri estontaj eventoj en KEL kaj klopodante pensigi la Estraron pri ili, por anticipi ilian malbonan efikon. Li skribis, ke en 2014 retiriĝos el la aktiva gvidado de KEL kelkaj ĝiaj estraranoj, ke la profesia sekretariino (Spomenka Štimec!) pensiĝos, ke ne estos repagitaj ĉiuj kreditoj por la ejo en Vodnikova ktp. Sed li atentigis, ke estos *plejparte perditaj ŝtataj subvencioj*, kaj ke la demografia strukturo de la esperantistaro daŭre malpliboniĝos. En sian prognozon li inkluzivigis ankaŭ krizojn en Esperanto-societoj, sed antaŭvidis, ke KEL povus akumuli financajn ŝuldojn, kiuj endangerigus la nmoveblajn en Vodnikova. Antaŭ ĉio, li invitis la estraron de KEL ekdialogi pri la akumultaj problemoj, speciale kun

la opoziciuloj. Li ankaŭ atentigis, ke sen necesaj ŝanĝoj, *KEL fariĝos la sola celo de sia ekzisto, organizaĵo sen membraro kaj aktivecoj*, kio en 2011 ankoraŭ ne estis klare videbla, ĉar la aktivecojn ĉefe realigadis manpleno da treege engaĝitaj unuopuloj, kio ne estas longtempe eltennebla.

LA "PROFETAĴO" REALIĜAS

Iom malpli ol kvar jarojn post la letero de *Pleadin*, bedaŭrinde ni devas konstati, ke lia "profetaĵo" realiĝas. Kvar opoziciaj membro de la Estraro (Hinšt, Jerković, Milošević kaj Pleadin) jam pli frue rifuzis partopreni la kunsidojn



Dum la nova Estraro de KEL estas ebruiĝita per kelkaj sukcesoj, la aferoj en la movado draste malpliboniĝas. Simileco kun "Titaniko": dum la orkestro ludas - la ŝipo daŭre kaj senhalte sinkas!

de la Estraro, ĉar ili ne konsentis kun la gvidpolitiko de la Estraro. Ĉe la membraro tio pasis preskaŭ nerimarkite, ĉar proksimiĝis la elektoj por la Estraro. Anstataŭ la kvar opoziciuloj, estis elektitaj novaj estraranoj. Fakte, la ĉefa celo de tia manovro estis silente forigi la kritikantojn, kaj en la Estraron, en kiu la decidpova "kerno" restu la sama, enkonduki novajn, junajn, nespertajn kaj nesufiĉe informitajn membrojn. Al la impresoj, ke ĉio estas en ordo, aldoniĝis, ke la Estraron samtempe forlasis ĝia ĉefa aganto Vjekoslav Morankić (kiu daŭre funkcias kiel ĝia ĉefa kolono "el ombro"), kaj la ĝistiaman prezidantinon Judita Rey Hudeček anstataŭis la nova prezidanto Anto Mlinar. Proksimume samtempe okazis ankaŭ aliaj ŝanĝoj: la sekretariino Ŝtimec pensiigis, sed daŭre laboras kiel volontulo, kaj la Estraron forlasis ankaŭ Nedeljko Korasić, ĉar KEL redonis al li la tutan prunton. Ĉio ĉi efektive okazis ene de ne pli ol unu jaro.

Pli ol la ŝanĝoj en KEL mem, zorgigas iliaj postsekvoj kaj la ĝeneralaj tendencoj en la socio.

La postsekvo de la pensiigo de Spomenka Ŝtimec estas reduktiĝo de la deĵorado en la oficejo de KEL en la strato Kneza Mislava 11/III. En majo 2015 pere de sia retejo KEL sciigis, ke la deĵoradon en la KEL-oficejo en Kneza Mislava transprenos dufoje semajne po du horojn (anstataŭ ĉiutagaj deĵoroj) **Tihana Mikša** (mardo 11h00-13h00 kaj merkredo 15h00-17h00).

Kiel sian ĉefan celon la Estraro de KEL difinis repagon de la kreditoj por aĉeto de apartamento en Vodnikova strato en Zagrebo. La kreditoj konsistis el la "ĉefa kredito", "kredito kun prokrastita repago" kaj "prunto de Esperanto-societo Rijeka". La "ĉefa kredito" estis banka kredito, anstataŭita per prunto de Nedeljko Korasić. Ankoraŭfoje mi devas akcenti, ke

la pruntkontrakto inter KEL kaj Nedeljko Korasić estis subskribita kaŝe, sen scio de la asembleo de KEL! **Kaj tiu ago estis unu el la aferoj, kiuj kaŭzis kverelojn kaj polusiĝon de la enlanda movado!** La "prokrastita kredito" estis prunto de neekzistinta Fondaĵo Trixini, fakte privata prunto de la duopo Spomenka Ŝtimec kaj Judita Rey Hudeček. Ankaŭ tiu prunto estis farita kaŝe, sen scio kaj konsento de la asembleo. **Ĝi estis la dua kaŭzo de la movadaj kvereloj kaj problemoj.**

En majo 2015 KEL informis, ke la "ĉefa kredito" estas komplete repagita, kaj ke el la "kredito kun prokrastita repago", nun jam nomata "Kredito de Esperanto-societo Trixini", restas por repago ĉirkaŭ 14.000 eŭroj. Kune kun la ŝuldo al Esperanto-societo Rijeka, restas do ĉirkaŭ 17.000 eŭroj da ŝuldo, kio estas bona rezulto, sed sen gravaj donacoj de **Blanka Pavlović-Devčić** (5.000 eŭroj) kaj **Anto Matanović** (5.280 eŭroj), la stato de la kreditoj ne estus tiel brila. Ĉiukaze, ankaŭ tie Pleadin pravis: ne ĉiuj kreditoj estas repagitaj!

La plej dolora fakto estas, ke Pleadin pravis rilate perdon de ŝtataj subvencioj. Per sia cirkulero al la estraranoj de KEL **Spomenka Ŝtimec** informis, ke la **Ministerio pri kulturo** oficiale informis KEL-on, ke ekde 2015 ĝi ne plu financos regulajn elspezojn de KEL. Kaj ankaŭ la subvencio por **Tempo** reduktiĝis al nur 5.000 kunaĵoj (fakte duoniĝis), sekve estonte aperados nur du numeroj de la oficiala gazeto de KEL.

Ni forlasu la financan kampon, kaj ni iru al la organiza. Se unuflanke plijuniĝo de la Estraro estas progresema paŝo, la rezultoj de tio ne montriĝis utilaj. Junaj homoj pro sia profesia laboro, simple ne povas aktiviĝi volontule kiel pensiuloj. Kiel videblas el la protokoloj de la Estraro, ĝi apenaŭ

sukcesas havi kvorumon. La 3-an kunsidon, kiu okazis la 21-an de februaro 2015, ne partoprenis Ŝeatović, Pulitika, Islamović, Grubišić-Popović, Farszky; la 4-an kunsidon, kiu okazis la 25-an de aprilo ne partoprenis Islamović, Grubišić-Popović, Klobučar, Farszky, Pulitika. Temas ĝuste pri junaj aktivuloj, per kiuj oni anstataŭis la opoziciulojn en la Estraro. Do, la Estraro reale konsistas el manpleno da malnovaj membroj, kiuj ja kaŭzis ĉiujn problemojn pri kiuj mi skribas, kaj ne estas perspektivo ke io ajn ŝanĝiĝos. Mi preskaŭ certas, ke la afero estas tiel planita, por konservi la antaŭan staton, en kiu decidis nur kelkaj homoj! Ankaŭ la foto de la lasta jarkunveno de KEL, okazinta la 21-an de majo, klare montras kiom malmultiĝis la asembleanoj. Sufiĉas nur kompari la fotojn de kelkaj antaŭaj jarkunvenoj!

Ĉiujn esperojn la Estraro de KEL havas rilate al 70 individuaj membroj, kvankam estas tre evidente, ke tiu nombro estas nereala.

Pleadin pravis, ke problemoj aperos ankaŭ en la membriĝintaj socioj. Tio jam estas tre evidenta, ĉar la membraro estas plejparte "fantoma", tiu kiu troviĝas en la listoj, sed reale ne ekzistas. Tiu stato eĉ malboniĝos pro la efikoj de la nova Leĝo pri asocioj, ĉar ne ĉiuj adaptos sian funkciadon al tiu leĝo, kaj sekve ĉesos ekzisti.

Ankaŭ pri la demografia bildo de la movado Pleadin pravis. Jam nun la meza aĝo de esperantistoj en Kroatio estas ĉirkaŭ 50-55 jaroj, kaj ĝi daŭre kreskas. Tion konfirmas la du sendependaj esploroj, tiu de Krunoslav Puškar el 2011 kaj la alia farita de DEC en 2012-2013. Inter 2011 kaj 2014 forpasis en Kroatio minimume 17 esperantistoj pri kies forpaso ni scias. La **demografia bildo** de Esperantujo en Kroatio jam de jaroj estas malpozitiva, ĉar la esploroj de DEC montras,



ke dum 25 lastaj jaroj forpasis minimume 300 geesperantistoj, kies forpaso estas dokumentita per nekrologoj kaj aliaj dokumentoj. Pri la societaj krizoj evidentas, ke Esperanto-societi "Estonteco" en Križevci jam ne ekzistas, "Mondo Paca" en Velika Groica reduktigis al kelkaj membroj, same krizas Sisak kaj Petrinja. Sed la krizo ne preterlasis ankaŭ la plej grandajn: Esperanto-societo Rijeka ankoraŭ nur surpapere havas 60 membrojn, Kroata Fervoja Esperanto-Asocio (KFEA) post multaj jardekoj devas translokiĝi. Ĝi ricevos alian societejon, sed pagados por ĝia uzado, kaj la membroj perdis la antaŭan privilegion pri malmultekostaj trajnvojaĝoj. Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo apenaŭ ekzistas. Ktp. ktp.

KEL ĉiam pli evidente fariĝas organizaĵo sen membraro, kaj sekve la celo por si mem!

La ejo en Kneza Mislava estas ankoraŭ uzata, sed regas necerteco ĝis kiam. KEL planas translokiĝi al Vodnikova, sed nur provizore. Per tio la multekosta Vodnikova, kiu kaŭzis grandajn kverlejojn kaj polusiĝon, ne plenumos la anoncitan celon: fariĝi centro de kroataj esperantistoj. Ĝi servos por ludonado, ĉar KEL, post perdo de ŝtataj subvencioj, bezonos aliajn monfontojn por plue funkcii. De tempo al tempo aperos riĉaj donacantoj, sed tiaj estas malmultaj kaj ĉiam pli raraj, kion konfirmas la listo publikigata en "Tempo".

La sola afero el la "profetaĵo" de Pleadin, kiu ankoraŭ ne realiĝis, estas akumuliĝo de ŝuldoj, kiuj povus endanĝerigi la nemoveblaĵon en Vodnikova strato.

Kaj tiel, dum la ŝipo daŭre sinkas, sur ĝia ferdeko okazas balo, kaj la Estraro de KEL kontentas pri la rezultoj. Ĉu la usa ruleto? Eble! Ni tamen preĝu al Dio, ke la lasta profetaĵo de Pleadin neniam realiĝu!

KIEL FARIĜI EKSMEMBRO DE KEL?

Facile! Almenaŭ laŭ la aktuala praktiko sufiĉas, ke la Estraro de KEL tiel protokolu, senkonsidere ke tio kontraŭas la Statuton de KEL! Okaze de la pasinta jarkunveno de KEL (la 21-an de majo) iu konstatis, ke Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kaj Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) ne estas membroj de Kroata Esperanto-Ligo, ĉar ili ne volas pagi membrototizon. Efektive ne temas pri malriĉaj societoj, kiuj ne povis kotizi, sed temas pri protesto kontraŭ la gvidpolitiko de KEL.

En la malnova Statuto de KEL, en la artikolo 14 estas skribite: **"La membreco en la Ligo ĉesas: per malfondiĝo de la Ligo, per skriba deklaro pri eksmembrigo kaj per eksmembrigo."** Kvankam la nove akceptitan statuton ni ne vidis, almenaŭ ĝia projekto en la artikolo 16 difinas ke **"la membreco povas ĉesi per persona deklaro pri eksmembrigo, per eksmembrigo pro malobeo de statutaj preskriboj aŭ nepagata kotizo"**. Sed jam la sekva artikolo klarigas, ke la decidon pri eksmembrigo devas akcepti la asembleo, kaj ke la eksmembrigo rajtas apelacii. Evidente KEL ne obeis sian statuton, ĉar:

- 1) UZE kaj DEC nek parole nek skribe petis eksmembrigon.
- 2) KEL ne eksmembris ilin, ĉar ili neniam ricevis kernan dokumenton, kiu ebligus ke UZE kaj DEC apelaciu en daŭro de 15 tagoj, kiel preskribas la Statuto de KEL.

Do, anstataŭ diskonigi misinformojn, la asembleo de KEL bonvolu fari tian dokumenton, kaj sendi ĝin al UZE kaj DEC, ĉar ili ne intencas pagi la kotizon antaŭ ol okazos bezonataj ŝanĝoj en la tegmenta organizaĵo. Verŝajne temas pri malfacila paŝo por KEL, ĉar por pufigi siajn raportojn, ĝi bezonas la aktivecojn de tiuj du organizaĵoj. Kaj ĝi konstante faras tion senkonsidere, ke ĝi opinias tiujn societojn eksmembroj!

KIAL KEL SILENTAS PRI DORH?

Kiel rezulto de grandaj konfliktoj en KEL dum kelkaj pasintaj jaroj, N.N. la 30-an de majo 2014 akuzis du funkciulojn de KEL ĉe ŝtataj instancoj. La dokumento estis sendita al DORH (Ŝtata prokuristaro de Respubliko Kroatio), kiu esploris la akuzon. Pri la afero estis intervjuitaj pluraj membroj de KEL, sed neniu el ili rajtis publike paroli pri tiu temo dum daŭris la esplorado.

Efektive DORH finis la laboron, kaj sendis sian opinion al N.N. la 3-an de februaro 2015.

Kvankam la jarkunveno de KEL okazis la 21-an de majo 2015, do pli ol du monatojn poste, inter la estraranoj de KEL regas fiŝa silento pri tiu temo. Dum la jarkunveno neniu eĉ per unu vorto menciis la aferon, kvankam kunvenis la supera organo de la Ligo. Plejparte la membraro eĉ ne scias, ke la akuzo okazis, kaj ke pri ĝi okupiĝis la ŝtataj institucioj, kiuj sankcias organizitajn krimojn. Malgraŭ la sperto, ke ne la veraj krimoj, sed ĝuste la (necesita) kaŝado de faktoj kaŭzis plej multajn problemojn en KEL, la Estraro daŭre gvidas la saman kaŝ-politikon.

Laŭ nia scio, DORH konstatis, ke surbaze de la rezultoj de faritaj krim esploroj, ne estas konfirmitaj faktoj, kiuj indikus pri plenumo de punebla ago, kiu estas sankciata laŭ oficiala funkcio. Do, ne estis trovitaj krimoj! Starigas la demando: Kial do KEL silentas?



La 67-a kongreso de BEA en Ruse -Parto de la kongresanoj.

BULGARA ESPERANTO-MOVADO VIDITA DE ALILANDANO

  *Josip Pleadin*

Raporto pri la 67-a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio Ruse, la 24-a ĝis la 26-a de aprilo 2015

Planinte la vojaĝon al Bulgario, antaŭ ĉio mi volis enprofundiĝi en la problemojn kaj la nunan staton de la bulgara Esperanto-movado. Dum jardekoj la movado tiulande estis unu el la plej fortaj, sed tiu epoko en la nuna ĵargono de bulgaraj esperantistoj nomiĝas “antaŭ la ŝanĝoj”. Kaj vere, la ŝanĝoj estis tiom grandaj, ke oni ne plu povas paroli pri “unu el la plej fortaj movadoj”, sed pri la movado havanta similajn problemojn, kiajn havas ankaŭ la ceteraj landaj movadoj en la balkana (sed ankaŭ eŭropa) regiono.

Sofion mi atingis post 13-hora busvojaĝo per “Florentiabus” el Zagrebo. Tie atendis min s-ano **Georgi Mihalkov**, kiu estis mia afabla gvidanto tra la ĉefurbo (kune kun s-ano **Georgi Mihajlov**), kaj

SUR LA FOTOJ: ① *Georgi Mihajlov kaj Georgi Mihalkov;*
② *Iam planita sed nefinkonstruita sidejo de BEA en Sofio,*
③ *Prezidanto de BEA Boris Gaĝanov,* ④ *Biblioteko "Ljuben Karavelov" en Ruse,* ⑤ *Kongresa akceptejo en la Hotelo "Riga",*
⑥ *La kongresejo,* ⑦ *Libroprezentoj dum la unua kongresa tago,*
⑧ *La publiko dum la libroprezento.*





poste akompanis min al Ruse, la urbo ĉe la rumana landlimo, kiu gastigis la 67-an kongreson de BEA.

Kiel poste mi komprenis, ne estis konkurencantoj por organizi la 67-an kongreson de BEA, kaj la situacion savis s-ino **Margarita Savova** kaj la loka societo de Ruse. La kongreso havas apartan gravecon por BEA, ĉar ĝi estas "supera organo" de la asocio. Neokazigo de kongreso kaŭzus gravajn konsekvencojn en la funkciado de la Asocio. Ankaŭ por la sekvontjara kongreso kandidatigis neniun societon, kaj fine **Veselka Kamburova** proponis, ke ĝi okazu en Sofio.

La kongresa akceptejo de la 67-a funkciis ekde mateno la 24-an de aprilo en la hotelo "Riga", kie loĝis plejparto de kongresanoj. Kaj ili ne estis malmultaj. Surprizis min la listo de 164 bulgarioj kaj 14 eksterlandanoj, aperinta en la kongresa libro, kvankam mi vetus, ke partoprenis pli ol 200 personoj. Mirigis min tamen, ke ili plejparte parolis bulgare. Min mem ne ĝenis tiu fakto, ĉar mi povis bone kompreni la interparolojn, sed kelkaj eksterlandanoj plendis pri tiu fakto. Aparte kritika estis la rumanaj samideanoj.

La kongreso komenciĝis per prezento de tri novaj libroj: "La viro el la pasinteco" (en Esperanto) kaj "La homo, kiu donacis revojn" (en la bulgara) de **Georgi Mihalkov** kaj "Sinonima vortaro de Esperanto" de **Emil Dimov** el Varno. La unuan el ili eldonis Dokumenta Esperanto-Centro en Ĵurdevac (Kroatio), kaj tiu fakto estis decida por mia vojaĝo al Bulgario. La libroprezento okazis dum la unua kongresa tago (la 24-an de aprilo) je la 17h00 en la urba biblioteko "Ljuben Karavelov". La libroprezenton inaŭguris inĝ. **Boris Gaĝanov**, prezidanto de BEA kaj la geaktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro **Veneta Zjumbjuleva** kaj **Nikolaj Uzunov**, kiuj emocie tralegis rakontojn el la bulgarlingva libro de Georgi Mihalkov.



Margarita Savova salutanta la kongresanojn



La jarkunveno de BEA



Elportado de malnovaj flagoj



Publiko dum la kultura programo



Prezentataj popolaj dancoj

Samtage je la 19h00 okazis interkona vespero en la restoracio "Kristal".

La ĉefa (labora) parto de la kongreso okazis la 25-an de aprilo. Prezidantino de la LKK **Margarita Savova** bonvenigis la kongresanojn, kaj la kongreson salutis ankaŭ reprezentantino de la distrikta estraro de Ruse. Kvankam mi ne estis oficiala sendito de KEL, mi eluzis la okazon por saluti la kongreson nome de kroatiaj esperantistoj.

Al eksterlandanoj estis proponite dum la labora parto de la kongreso trarigardi la urbon, sed mi preferis resti kaj aŭskulti la bulgarlingvajn raportojn, kiuj tre detale konigis la funkciadon kaj problemojn de la organizaĵo de bulgaraj esperantistoj.

La jarkunvenon partoprenis 39 delegitoj el 27 societoj, kio signifas, ke ĉiuj memrosocietoj estis reprezentitaj, ĉar en la raporto estis menciite, ke en la jaro 2014 la kotizon pagis 420 membroj el 27



Honora membro de BEA

societoj kaj 10 individuoj. Kompare kun tiu jaro, estis rimarkebla malkresko, ĉar la kotizon por la jaro 2015 ĝis la kongreso pagis 336 membroj. Laŭ la statuta paragrafo 19, por plenvolvide partopreni la jarkunvenon, ĉiu membro devas pagi sian kotizon unu monaton antaŭ la okazigo de la kunveno,

En postaj interparoloj mi volis ekscii iom pli pri la organizo de la movado en Bulgario. Kiel mi eksciis, nur BEA havas juran personecon, kaj la memrosocietoj estas ĝiaj filioj. Tio iomete faciligas la funkciadon de societoj, sed limigas iliajn rajtojn kaj eblecojn. Pro tiu fakto kelkaj societoj eksmembriĝis kaj jure registriĝis, plejparte kiel kulturdomoj (ekz. en Razgrad). Laŭ la valida leĝo, en Bulgario estas bezonataj 5 personoj por fondi societon.

Nun la Asocio “estas stirata” de kapabla kaj fervora prezidanto, inĝeniero **Boris Gaĝanov** kaj la Estraro, elektita en 2013 kaj konsistanta el: **Maja Gorova** (viceprezidanto), **Georgi Mihalkov** (sekretario) kaj membroj **Veselka Kamburova** kaj **Snejinka Angelova**. Kontrola komisiono konsistas el **Antoaneta Nikolaeva** (prezidanto), **Gena Antonova** kaj **Todorka Stojanova**. Ĉar en 2016 oni devos elekti novan prezidanton, jam funkcias la elekta komisiono, gvidata de **Mariana Evlogieva**, kiu akceptas proponojn.

Dum la asemblea kunsido la prezidanto **Gaĝanov** prezentis ampleksam laborraporton por 2014, komentinte, ke ĝis la kunsido nur 8 societoj sendis siajn raportojn al BEA. Li menciis, ke pluraj societoj gvidis kursojn, sed forestas la atendita sukceso pro la forteco de la angla, kiu minacas Esperanton. La bulgara Ministerio pri edukado permesas gvidadon de Esperanto-kursoj en lernejoj, sed tio ne estas ofte praktiata. La prezidanto laŭdis la kursojn de Georgi Mihalkov, gviditajn en Sofio.

En 2014 estis presita la bulgarlingva eldono de la “Zagreba Metodo”, adaptita de **Mariana Evlogieva**. Aperis 300 ekzempleroj, kaj la eldono rezultigis pro la vizito de la estrarano de UEA **Stefan MacGill** kaj la monhelpo de UEA de 330 eŭroj.

Regule funkcias la retejo kaj la oficejo de BEA (dufoje semajne), situanta en Sofio, en la strato “Stranĝa” n-ro 79-81. Aperas la oficiala organo “Bulgara Esperantisto” (200 ekzempleroj), redaktata de **Georgi Mihalkov**, sed estas konstatite, ke sen plimultiĝo de abonantoj, ne estas kovrataj la elspezoj por ĝia eldonado.

En la periodo “antaŭ la ŝanĝoj”, BEA estis forta ne nur laŭ la membraro, sed ankaŭ laŭ siaj posedaĵoj. Ĝi posedis multajn nemoveblaĵojn, el kiuj aktuale

restis posedataj nur kelkaj en Sofio, Pazarĝik, Sliven, Smolen, Drjanovo, Plovdiv kaj Ĉepelare. Temas pri apartementoj kaj domoj, kiujn oni luadonas. Kelkaj el ili ne estas lueblaj pro manko de intereso, kelkajn uzas societoj por siaj aktivecoj, sed la Estraro de BEA klopodas aŭ plue ludoni, aŭ vendi ilin.

Regule okazas la poezia konkurso en Razgrad, funkcias Bulgara Esperanto-teatro, kaj en 2014 okazis fervojista kunveno (en oktobro).

Gaĝanov menciis la problemojn pri kandidatoj por estontaj kongresoj kaj malfruan pagadon de menditaj servoj, kio ĉe la organizantoj rezultigas problemojn, ĉar ĉiuj menditaj servoj por la kongreso estas rezervataj kaj pagataj per garantiaj sumoj (do anticipe).

En la raporto estis menciita ankaŭ la vortaro de **Emil Dimov**, kiun li eldonis proprakoste.

Laŭ la statistiko, la societoj de BEA ne ĉiam havas propran ejon, sed kunvenas en bibliotekoj, kulturcentroj kaj en aliaj lokoj. Internaciajn aranĝojn organizas Galabovo, Ŝumen, Razgrad kaj aliaj.

Kiel bona ekzemplo de informado estis emfazita la raporto aperinta ĉe NovaTV, kaj la intervjuo de **Georgi Mihalkov** ĉe Eurocom (la 5-an de marto 2015).

BEA rememoris ankaŭ pri la UNESKO-rezolucio de Sofio, kaj en septembro 2014 havis viziton de **Renée Triolle**, kiu faris rondvojaĝon kaj vizitojn al kelkaj societoj.

En la bulgara movado okazis multaj problemoj pro la perdiĝo de dokumentoj, kiuj povis pruvi posedon de nemoveblaĵoj (ekz. rilate la iaman hotelon en Pisanica), sed ankaŭ pro internaj kaj personaj konfliktoj.

Nuntempe senperspektiva situacio ekzistas ĉe la firmao “Globus”, 51-procente posedata de

BEA. En 1987 tiu firmao havis la kapitalon de 20.000 levoj, kaj ĝia direktoro **Petar Todorov** en 2014 raportis pri ĉesigo de aktivecoj. BEA klopodas fermi ĝin, same kiel sian filion en Targovište.

Antaŭ 1989 en BEA laboris 24 profesiaj oficistoj pagataj de la ŝtato, sed post tio okazis gravaj ŝanĝoj kaj nun laboras nur volontuloj. **Gaĝanov** dankis al ĉiuj aktivuloj de la tuta lando kaj proponis ke oni vendu la nemoveblaĵojn de BEA en Plovdiv, Smolen kaj Ĉepelare.

En la financa raporto de **Maja Gorova** estis dirite, ke en 2014 BEA havis enspezojn de 21.184 levoj, kaj la elspezoj sumiĝis je 16.060 levoj. Por 2015 estas planataj enspezoj de 24.216 kaj elspezoj de 21.188 levoj.

La kontrolkomisionan raporton legis **Antoaneta Nikolajeva**. El tiu raporto ni ekscias, ke la kapitalo de BEA estas 350.000 levoj kaj amortizado por 2014 25.194 levoj. Ŝi proponas, por ke ne okazu pliaj perdoj de nemoveblaĵoj, ke la dokumentojn pri posedo BEA konservu en apartaj dokumentujoj.

En la diskutoj estis klare starigita psotulo, ke BEA transformiĝu al kultura organizaĵo, kaj oni pledis ankaŭ por kompletigo de kongresoj per kulturaj programoj (“helpi al eksterlandanoj, kiuj kontribuas kulture”, proponas **Kateva**). **Kateva** komentis ankaŭ, ke helpo de 500 levoj donataj de BEA al organizantoj de kongresoj ne sufiĉas, kaj ke oni devus pripensi pligrandigon de tiu sumo, por ke ne ripetiĝu la ekzemploj, kia estis okaze de la 67-a, kiam **Savova** el Ruse lastmomente savis la situacion per invito kongresi en tiu urbo.

Mihalkov proponas, ke la enspezoj, akireblaj per vendo de nemoveblaĵoj estu uzataj por helpi funkcion de la societoj, tamen atentigas, ke advokatkostoj ĉe vendoj estas tre altaj kaj voras multe da mono.

En la dua parto de la kunveno, s-ino *Angelova* proponis, ke en junio 2016 okazu Esperanta balkana renkontiĝo en Razgrad kaj iuspeca balkana instruista seminario.

Radka Stojanova invitis al konkursoj “Esperanto en mia vivo” kaj “Esperanto en mia loĝloko”, kiun organizos Razgrad.

Estis tuŝita ankaŭ la demando pri iam planita bulgara Esperanto-enciklopedio, publikaj rilatoj de BEA kaj aliaj temoj.

Mariana Genčeva el Polski Trambeŝ informas pri la aktivecoj de ŝia lernejo en la projektoj “Komenius” kaj “Erasmus”, financataj de Eŭropa komisiono. Ŝi akcentas la eblecojn de esperantistoj, kaj ke ŝi serĉis aliajn lernejojn por EU-projektoj, sed ne trovis ilin en Bulgario.

Kongresanino el Burgas parolis pri tio, ke instruado de Esperanto en lernejoj, malgraŭ la pozitiva starpunkto de Ministerio de edukado, ofte dependas de lernejoj direktoroj. *Mihalkov* petis, ke ĉiuj, kiuj alfrontas tiajn problemojn, raportu pri tio al BEA.

Rilate la enciklopedion *Mihalkov* klarigas, ke la kompleta kolektita materialo restis ĉe *Canko Ignev*, kiu intertempe mortis, kaj ke oni devus rekomenci la laboron ekde nulo, kio estas malfacilega.

Snejinka Angelova diras, ke Esperanto estas lernebla kiel libera objekto (laŭ Ministerio de edukado), el kio 22 horoj estas pagataj al la instruistoj.

Unu el la delegitoj proponis, ke oni invitu Universalan Kongreson de Esperanto al Bulgario por la jaro 2018, kaj klopodu realigi la 2-an kongreson de ĵurnalistoj-esperantistoj.

Maja Gorova esprimas sian malkontenton pri la proponoj, ĉar temas pri nerealaj atendoj kaj eblecoj.

Post unuanima akcepto de ĉiuj raportoj, *Maja Gorova*

transdonis distingojn al meritaj bulgaraj esperantistoj. Honoraj membroj fariĝis *Stefan Nikolaev Georgiev* (el Ŝumen), *Gančo Jordanov Ganev*, *Blagovesta Ivanova Uzunova* (el Jambol) kaj *Elena Vasileva Popova* (el Dobriĉ).

Fine de la kongreso oni decidis, ke la 68-a kongreso de BEA okazu en Sofio, verŝajne en aprilo 2016.

Post la oficiala parto sekvis riĉa kultura programo, dum kiu la geaktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro *Veneta Zjumbjuleva*, *Darinka Goranova* kaj *Nikolaj Uzunov* recitis poemojn de la elstara bulgara esperantista poeto kaj tradukisto *Venelin Mitev* kaj legis rakontojn de *Georgi Mihalkov*. Infanoj kaj lernantoj el la Regiona Komunuma Kulturcentro en urbo Ruse dancis kaj kantis. En la

programo estis prezento de orkestro el urbo Ruse kaj infana kantgrupo “Sun0”. Dancis baletgrupo “Flamingo 98” kaj aliaj.

Samvespere okazis la solena vespermanĝo en la restoracio de la Hotelo “Riga”.

La 26-an de aprilo 2015 la kongresanoj ekskursis al Bukureŝto, Rumanio, sed mi devis forveturi tiumatene.

La 67-a kongreso de BEA en Ruse estis sukcese organizita dank' al la loka Esperanto-societo “Liber0” kaj la ĉefa organizantino *Margarita Savova*. Tamen, en la memoro de eksterlandanoj ĝi havas la epiteton “Esperanta kongreso en kiu Esperanto ne estis parolata”. Tre bedaŭrinda afero, ĉar en privataj interparoloj kun multaj kongresanoj mi konstatis, ke ne temas pri nesocio de Esperanto.

INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO “ĤRISTO GOROV – ĤRIMA”

Ĥristo Gorov – Ĥrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso havos la jenajn branĉojn:

- poezio
- prozo
- eseoj

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale, verkitaj en Esperanto.

La noveloj devas esti ĝis 4-paĝaj kaj ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale, verkita en Esperanto.

La poemoj, noveloj kaj la eseoj devas esti komputile kompostitaj.

La konkurso ne havas apartan temon.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 31-a de decembro 2015 al:
modest@abv.bg

aŭ per poŝto al :

Georgi Mihalkov, Sofio – 1229.

“Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

Venelin Mitev

FABELO PRI BULGARA KNABINO

Al R.

Mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
mi longe vin serĉis
ĝis nun,
tra dudek montaroj
kaj multe da maroj,
sub vento kaj suno,
kaj lun'.

Revante pri via
talio gracia,
banata de l' suna
leviĝ',
pri via rigardo,
brilanta kun ardo,
soifa al vivofeliĉ',
mi kreis fabelon -
palacan kastelon
kun lago kaj ora
ŝtupar',
kun ombro ĝardene,
de kie matene
vin vekos per kantoj
birdar'.

Tra dudek montaroj
kaj multe da maroj,
sub vento kaj suno,
kaj lun',
mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
kaj longe vin serĉis
ĝis nun.

Kaj jam lacigite
de l' iro, kun miro
mi haltis subite:

al mi
belega knabino
samkiel feino,
kun svelta, gracia
tali'
kaj ĝoja rigardo,
brilanta kun ardo,
soifa al vivofeliĉ',
alpaŝis tremkore
kaj floro-odore
ŝi flustris: Ĉu estas
ja vi?

Mi kredis, ke iam
vi venos, kaj tiam
vi restos en nia
hejmland'.
Ĝi staras gastame
kaj baldaŭ akrame
akceptos vin, kara
vagant'!"

... Mi staris kaj
miris,
vin ĝue admiris
kun plena, serena
anim',
ĉar vin, mia bela
feino fabela,
mi trovis en mia
proksim'.

Mi longe vojaĝis,
veturis kaj naĝis,
por fine kompreni,
ke pli
ravantaj knabinoj
en ĉiuj terlimoj
ne estas, ol estas
ĉe ni.

(1964)
El la poemaro
"Somero cigana"
(Sofio, 1993)



VENELIN MITEV estas bulgaro. Internacia ĵurnalisto, iama korespondanto de Bulgara informagentejo (BTA) en Moskvo kaj Parizo. Li naskiĝis en 1942, studis la bulgaran kaj francan lingvojn en la Sofia Universitato. Li estis ĉefredaktoro de semajna revuo "Paraleli" kaj de "Bulgara Esperantisto" en la jaroj 1999-2002. Kiel vicprezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio li aktivis en la jaroj 1990-1996 kaj kiel vicprezidanto de la fondaĵo "Socio kaj Esperanto" ĝis 2000. Li estis fondinto kaj direktoro de la eldonejo "Pres-Esperanto" kaj redaktoro de porvirina bulgarlingva revuo "Za ĵenata". Li redaktis la periodaĵojn "Mondo" (1992-1995) kaj bulgarlingvaj gazetojn pri Esperanto. En la bulgaran li tradukis Esperanto-poemojn de Auld, Boulton, Kalocsay, Sekelj, Silfer, Urbanová, De Kock kaj aliaj. Li esperantistiĝis en 1958, verkis poemojn kaj tradukis beletron el la rusa kaj franca. Verkoj: "Somero cigana" (poemoj, 1993). Kun aliaj bulgaroj li tradukis "De bordo al bordo" (de Elisaveta Bagrjana, 1988) kaj "Mi ĉiam tia rememoru vin" (antologio de bulgara ampoezio, 1992).



LA OKLINGVA MEDICINA VORTARO ENHAVAS ESPERANTON

 Jozo Marević

La oklingva medicina enciklopedia vortaro de Prof. d-ro sci. Jozo Marević, kiu enhavas la latinan, anglan, francan, germanan, hispanan, italan, Esperanton kaj la kroatan aperos en septembro 2015. Jen kion pri ĝi skribis la aŭtoro.

La projekto de mia oklingva medicina vortaro estas imagita tiamaniere, ke la vortaro ne estu tro enciklopedia kaj faka, sed pure informa, ĉar oni konsideras, ke potencialaj hodiaŭaj uzantoj bezonas, fakte kaj ĝuste, verajn ĝustatempajn orientigajn informojn.

La medicinaj sciencoj kaj la medicino ĝenerale, kiel primara humanisma scienco, hodiaŭ kunkreskas kun la homaj deziroj, kun liaj vitalaj bezonoj, kun lia sano, unuvorte kun lia destino.

La latina lingvo, kiel ĉefa kaj fundamenta, estas la komenca lingvokolono, ĉar ĝi estas baze enradikiĝinta en ĉiuj aliaj lingvoj kaj metalingvoj, antaŭ ĉio en la medicina lingvo. Aliflanke, la latina lingvo enradikiĝis en tiuj unuopaj lingvoj kaj en tiuj naciaj kulturoj jam delonge, preskaŭ antaŭ du jarmiloj.

Ĉar la medicina nomenklaturado estas plejparte grekdevena, por ĉiu tia vorto-lemo estas klarigita originala signifo greklingva. Tiusence la kunmetitaj vortoj estas eksplikitaj laŭ siaj konsistaj partoj. Tia etimologia analizo havas grandan senco en valordifinado kaj korekteco de konstruado de la kunmetitaj vortoj, kio kontribuas al pli bona kompreneblo kaj memorkapablo de la latinaj terminoj kaj de esenco de iliaj senco kaj graveco.

Alivorte, apud ĉiu nocio estas aldonita la greka, ofte ankaŭ la latina etimologio, kie kaj kiam bezonate. Tiamaniere klasikaj lingvoj, la greka kaj la latina, "kovradas" signifojn de multaj modernaj scienckampoj, medicinaj sciencoj, novtempaj malsanoj kaj kuracmetodoj, sciencaj bezonoj kaj



interesoj en la hodiaŭa medicino.

En kontrastiva paralelismo de lingvoj, uzitaj en ĉi tiu medicina vortaro, respeguliĝas abundego da komunaj elementoj,

per kiuj la lingvoj el nia vortaro estas interligitaj en la globalan tutajon de eŭropa esprimmaniero.

En la vortaro estas uzata mallongigo *ilo*. Kial? Longtempe resonadas tiu mallongigo, kiun enkondukis jam mortinta Helmar Frank, la plej konata esperantista kibernetikisto (lia mallongigo *Ilo* signifas "Internacia Lingvo", latine "Internationalis lingua"). Dua grava persono, ege grava kaj tutmonde konata juristo, vivinta longtempe en Londono, naskita en Split kaj preskaŭ neanstataŭebla homo en internacia Esperanta movado, estas la multjara prezidanto de UEA Ivo Lapenna. Sekve, la elektita mallongigo *ilo* estas viva memoro al ili.

Ĉu aldoni ankaŭ *ILon* en la vortaron? Antaŭ kelkaj jaroj mi tute ne pripensadis la eblecon ellasi ĝin, ĉar se oni demandus esperantistojn, mi estas tutcerta, ke ĉiuj respondus: JES!!!, en la vortaro nepre aldonu *ILon*!


Pro tio, por Esperantlingva kontribuo, samkiel por aliaj lingvoj, uzitaj en la vortaro, estis bezonataj pliaj fakuloj: kunaŭtoroj, redaktoroj, korektistoj...

La nuna situacio kaj stato de la vortaro montras, ke la komputilisto prilaboras la tekstojn, por ke la vortaro povu esti presita en septembro 2015.

La vortaro enhavas minimume 50.000 lemojn (pri medicina lingvo kaj paralingvoj), ĉirkaŭ 500 mallongigojn, kaj entute 3 000 paĝojn!

Aliaj detaloj sendube estos diskutotaj multfoje.

Vidu la reklamon ĉe la eldonisto: <http://izdavastvo-marka.hr/naslovi.html>



KUMEŬAŬA FINFINE EN LA FRANCA

La plej fama verko de Tibor Sekelj certe estas *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, kiu aperis en multaj lingvoj, sed ĝis nun mankis en unu el la plej grandaj mondaj lingvoj – la franca. Tiun mankon per sia traduko korektis *Anne*


JauSSIONS el Argenteuil (Francio). Anne estas franca esperantistino, kaj ŝia traduko en majo ĉi-jare aperis ĉe Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurdevac (Kroatio) sub la titolo *Kumewawa, Le fils de la jungle*. Temas pri 80-paĝa, fortike

bindita libro, kiun per siaj plaĉaj plenkoloraj desegnaĵoj ilustris *Violaine Macquet*.

La libro mendeblas ĉe la tradukintino:

anne.jauissions@orange.fr

NOVA NOVELARO DE JULIAN MODEST



En aprilo ĉi-jare, senpere antaŭ la 67-a kongreso de BEA, Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurdevac (Kroatio) eldonis novan "novelaron, originale verkitan en Esperanto" de *Julian Modest*, bulgara Esperanto-prozisto. En la 106-paĝa libro "*La viro el la pasinteco*" aperis 23 noveloj de Julian Modest (veranome Georgi Mihalkov), verkitaj en 2012-2014. La libro estis solene prezentita dum la bulgara landa kongreso en Ruse, la 24-an de aprilo, en la biblioteko "Ljuben Karavelov".

La libro mendeblas ĉe DEC: dec.kroatio@gmail.com

Prezo: 90,00 kunaĵoj / 12,00 eŭroj



ANKORAŬ UNU KOMUNA TRADUKPROJEKTO

 Redakcia kompilo

Post la sukceso de la komuna tradukprojekto de "De Patagonio ĝis Alasko", Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac (Kroatio) entreprenis novan projekton, dum kiu 10 esperantistoj tradukis el la serba la verkon de Tibor Sekelj *"Tra la lando de kanguruoj"*. Ĝus aperis la libro, por kiu sian tradukan kontribuon donis: Mila Bečka, Marijan Benc, Mihaela Cik, Davor Grgat, Dimitrije Janičić, Marija Jerković, Zlatoje Martinov, Zdravka Metz, Radojica Petrović, Josip Pleadin, Zdenka Polašek, Stanko Rukelj kaj Zdravko Seleš

kaj provlegis Tomasz Chmielik, Erzsébet Székely kaj Nicole Else.

Kun aparta danko la eldonisto devas mencii, ke la aperon de ĉi tiu libro, per sia financa helpo ebligis *Melburna Esperanto-Asocio* kaj aŭstralia esperantisto *Daniel Kane*.

La libro estas 84-paĝa, fortike bindita. En ĝi aperis 14 rakontoj el la aŭstralia kaj novzelandana vojaĝoj de Tibor Sekelj en la jaroj 1970-71.

La libro mendeblas ĉe DEC: dec.kroatio@gmail.com
Prezo: 90,00 kunaĵoj / 12,00 eŭroj



ESTONTAJ ELDONPROJEKTOJ

El diversaj fontoj nia redakcio eksciis, ke pluraj eldonistoj en Kroatio planas eldoni novajn librojn en Esperanto.

La plej aktiva estas *Dokumenta Esperanto-Centro (DEC)* el Ĝurdevac, kiu por la jaro 2016 preparas eldonon de nova libro de *Tibor Sekelj "Vojaĝo ekster la tempo"*. La verko estas parte tradukita, kaj parte tradukas ĝin grupo de tradukantoj en la tria komuna tradukprojekto de DEC. Ĝi ampleksas ĉirkaŭ 250 paĝojn.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) planas ĝis la fino de 2015 publikigi la dulingvan, iom pli ol 100-paĝan studon de *Velimir Piškorec* pri la fama kroata lingvisto *Tomo Maretić*, kiu enhavas ankaŭ lian paroladon *"Pensoj pri artefarita monda lingvo"*, kiun li prezentis al membroj de jugoslavia akademio la 10-an de decembro 1891, kaj en kiu li pritraktas la temon de artefaritaj lingvoj. La verko estas tradukata.

Dokumenta Esperanto-Centro pretigas por eldono la 300-paĝan verkon de *Ivo Andrić "La ponto super Drino"*, tradukitan de *Antonije Sekelj*. Por tiu eldono DEC ricevis permeson por publikigo en la prestiĝa serio "Oriento-Okcidento" de UEA/UNESKO. La libro ricevis la numeron 51 kaj estas planata por eldono en 2016.

En sia eldonplano por 2016 *Bjelovara Esperantista Societo* havas poemaron de konata bjelovara kaj kroata poeto kaj esperantisto *Željko Sabol*, kies amplekso kaj enhavo ankoraŭ ne estas koantaj.

Kroata Esperanto-Ligo (KEL) jam delonge anoncis aperon de la libro de *Ferid Muhić "Ex cathedra"*. Ni ne havas precizajn informojn pri la stato de tiu projekto.

Ĉi-somere estos fintradukita la ampleksiga (ĉirkaŭ 750-paĝa) verko de *Miroslav Krleža "Bankedo en Blitvo"*, kiu postulos multege da laboro kaj mono por esti

publikigita. Ĉar temas pri gravega verko el la kroata literaturo kaj fama verkisto, ni esperas, ke ankaŭ ĝi iam aperos. Ĝi devus aperi en du volumoj. La tradukon faras *Tomasz Chmielik*, kaj laŭplane estas eldoni ĝin *Dokumenta Esperanto-Centro*. Se ĝi aperos, ĝi estos la plej ampleksa verko ĝis nun eldonita en Esperanto en Kroatio.

Intertempe Josip Pleadin kunlabore kun Tomasz Chmielik partoprenas en prespetigo de pluraj verkoj el diversaj lingvoj, kiuj aperos en Pollando. La plej freŝa el tiuj estas la ĵus aperinta verko *"Mi inventas la mondon"* de la pola Nobel-premiita verkistino *Wiesława Szymborska*. Tiu libro aperis en la serio "Oriento-Okcidento" sub la numero 50.

Se vi, karaj legantoj, scias pri aliaj eldonprojektoj, dividu viajn eksciojn kaj planojn kun ni, kaj trovu la plej facilan kaj plej mallongan vojon por realigo de viaj ideoj.

KANTADO PER KORO VALORAS PLI OL ORO

 Josip Pleadin

La 16-an kaj 17-an de majo en Vroclavo (Pollando), okazis la tria Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiun ĉi-jare partoprenis la koruso "Gajuletoj" el Elementa lernejo Davorin Trstenjak el Zagrebo (Kroatio). Bonvolu legi la raporton pri la festivalo, originale verkitan por "Pola Esperantisto"



Se io okazas jam la trian fojon, tio signifas, ke formiĝas vera tradicio, kaj la aranĝo estas sukcesa kaj meritanta la atenton de pli vasta publiko. Tiu principa opinio montriĝis tute ĝusta en la kazo de la ĉi-jara *Eŭropa Festivalo de*

Esperantaj Kantoj, okazinta la 16-an kaj 17-an de majo en Vroclavo (Pollando).

Vroclavo senspirigas la vizitanton per sia gotika kaj baroka arkitekturo, kaj tiun senton de emociiĝo antaŭ io bela, la partoprenantoj kaj spektantoj de la vroclava Esperanta muzikfestivalo transportis ankaŭ en la festivalajn salonojn. Al Esperantaj aranĝoj oni ne ĉiam venas kun grandaj esperoj, sed ĉi-foje la vizitantoj agrable surpriziĝis. Kiel mi jam plurfoje papagis: "La Festivalo estis ĝinda de la komenco ĝis la fino". Kaj tion mi volas ripeti kaj aldoni, ke kantado per koro valoras pli ol oro! La muziko estas tiu subtila vibrado, kiu tuŝas rekte la koron kaj instigas ĝin kanti kaj ĝoji, kaj tio donas novan dimension al la homa vivo. Kiel videblis sur la vizaĝoj de kandidatoj en la vroclava festivalo, ili vere kantis el fundo de siaj koroj, speciale la infanoj, kvankam la infansento pri muziko ne mankis ankaŭ ĉe la senioroj.

La unua festivala tago okazis en la Ekonomika Universitato, kaj jam tie videblis, ke ne temas pri kutima Esperanta aranĝo. Sed, la kulmino de la festivalo estis la Koncerto de Laŭreatoj, kiu okazis dimanĉe, la 17-an de majo, en la prestiĝa ĉefa salono de la impone renovigita Ĉefa Fervoja Stacidomo en Vroclavo.

Kio montriĝis kvalitoj kaj mankoj de la Festivalo? Kvankam la organizantoj per siaj plurmonataj klopodoj montris la tutkoran entuziasmon por organizi bonegan programon, trovi kvalitajn kantistojn, kunlaborantojn por la organizaj laboroj kaj ĵurio, perfektan ejon por la koncerto de laŭreatoj, sponsorojn ktp., multajn aferojn, karakterizajn por la Esperanto-movdo, oni ne povis influi. Iliajn klopodojn grave helpis la pozitiva akcepto de Esperanto en la pola medio dank' al agado de la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo, kies ĉiumonatajn raportojn sendas al ni la direktorino de la organizaĵo *Malgosia Komarnicka*. Sed oni

Interkultura Centro Herzborg PATRONAT HONOROWY
Mila van der Horst Kulińska
senator Edmund Wimbodzi
prof. Jan Miodek

III Europejski Festival Piosenki Esperankiej
MUZYKA I ESPERANTO ŁĄCZY POKOLENIA

DLA DZIECI, MŁODZIEŻY, DOROSŁYCH I SENIORÓW

KATEGORIE: ZESPÓŁ/CHÓR, SOLISTA
ZGŁOSZENIA DO 15 KWIEŹNIA
tel. 596 386 383 info@wep.pl
PRZESŁUCHANIA: sobota 16 maja, godz. 10.00-18.00
Uniwersytet Ekonomiczny we Wrocławiu, ul. Kamienna 43-59,
Aula Centrum Kształcenia Ustawicznego

WREŹCZENIE NAGRÓD,
KONCERT LAUREATÓW:
niedziela 17 maja, godz. 15.00-17.00
Dworzec Główny PKP, ul. Pihudskiego 105,
Sala Sesijsna

ZAPRASZA ORGANIZATORZY Wrocław

devas diri sincere, ke la muzika branĉo en Esperantujo estas relative malriĉa, ke ekzistas malmultaj individuoj, muzikbandoj, grupoj kaj korusoj, kiuj funkcias en tiu specifa atkampo, kaj ke la nivelo de la Esperanta muziko estas malpli alta ol la naciaj muzikaĵoj. Ĝuste pro tio la klopodoj de la organizantoj havas speciale grandan valoron! Ili ja agadas en malfacila laborkampo, ofte evitata de aliaj organizantoj, kaj tial eĉ malgrandaj sukcesoj signifas milmejlajn progreson! Pro la nesufiĉa evoluiteco de muziko en Esperantujo estis malfacile organizi la festivalon, kiu havus la epiteton de eŭropa aranĝo. Verdire, sian internaciecon ĝi dankas al la internacie konataj melodioj, kiujn prezentis la kandidatoj, kaj al la bedaŭrinda fakto, ke nur unu alilanda koruso venis al Vroclavo ("Gajuletoj" el Zagrebo, Kroatio). Sed, aliflanke, mi devas akcenti tion, kio donas apartan valoron al la festivalo. La partoprenreguloj anoncis, ke ĉiu kantgrupo aŭ solisto devas prezenti du kantojn: unu en Esperanto, kaj la alian en la nacia

lingvo. Pro tio sur la festivala scenejo debutis pluraj neesperantistaj kantistoj kaj korusoj per Esperantaj kantoj. Kelkaj el ili per siaj bonkvalitaj, fojfoje eĉ mirinde bone prezentitaj kantoj, levis la kvaliton de la festivalo je kelkaj ŝtupoj pli alte, ol se ĝi estus rezervita nur por esperantistoj. Kaj antaŭ ĉio, la festivalo signifis grandan elpaŝon de esperantistoj el la "verda getto", respektive sinprezenton aŭ neesperantista publiko en pozitiva lumo. Prezentiĝis tie kantoj ĝenerale konataj inter esperantistoj, ekz. "Guantanamo" eĉ en du variantoj, sed oni povis aŭskulti ankaŭ senriproĉajn prezentojn de kantoj, kiujn esperantistoj ne konas.

Mi erarus, se mi apartigus iun kantiston aŭ koruson, ĉar tiu opinio devenus el la propra prefero. Tial mi prezentas al estimataj legantoj la decidojn de la festivala jurio, kiun per lerteco de profesiulo gvidis la ĵazkantisto **Marek Balata**, asistata de profesia mizikisto kaj esperantisto **Wojtek Lawnikowicz**, esperantisto **Zdzisław Koczarski**. La festivalo okazis en tri aĝkategorioj

(kantistoj malpli ol 18-jaraj, pli ol 18-jaraj kaj senioroj) kaj en du subkategorioj (korusoj kaj solistoj). En la kategorio de malpli ol 18-jaraj festivalanoj la plej bonaj korusoj estis "**Górowianie**" el Góra kaj "**Gajuletoj**" el Zagrebo kaj inter la solistoj **Amelia Wójtowicz** kaj **Amelia Górska**. En la kategorio de pli ol 18-jaruloj la plej bona estis la kvarteto "**Rondanaro**" kaj inter la solistoj **Aleksandra Sereżyńska** kaj **Patrycja Bogdala**. Ĉe la senioroj por la plej bonaj estis proklamitaj la korusoj "**Atena**", "**Dumka**" kaj "**Apasjonata**", kaj inter la solistoj **Mieczysław Nitschke** kaj **Kazimierz Kudryński**.

La Festivalon kune organizis Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo (la E-organizaĵo) kaj la Vroclava Centro de Pliiĝuloj (la ne E-organizaĵo). Al ĝia sukceso sendube plej multe kontribuis la ĉeforganizantoj **Małgosia Komarnicka**, **Robert Pawliuszko** kaj **Anna Ejfler**, kun aro da aliaj kunlaborantoj kaj sponsoroj. Gratulon al ili, kaj ek al la Kvara!



... sed tio ne estas ĉio!

Al Vroclavo vojaĝis 25 membroj de la koruso "Gajuletoj": Gabrijela Antunović, Iva Bagarić, Lara Bakić, Ivan Braintelfeld, Ivan Duvnjak, Paula Hranilović, Laura Korboni, Marko Korboni, Filip Landek, Viktorija Lonĉar, Sara Ljubaj, Ivan Matana, Matej Matana, Laura Matijaca, Lucija Sorić, Petar Sorić, Bruno Sporiš, Klaudija Šiprak, Luka Unković, Marija Vešnik, Viktorija Vlahek, Petra Vukušić, Lucija Zrna **kaj kvar plenkreskaj gvidantoj:** Silvija Fostaĉ, Mia Fostaĉ, Marija Jerković kaj Josip Pleadin.

La vojaĝon organizis **Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE)**, kun senrezerva helpo de **Elementa lernejo Davorin Trstenjak** kaj ĝia direktoro **Darko Cindrić**.

La koruson trejnus la instruistino **Silvija Fostaĉ**.

La vojaĝon subvenciis la **zagreba Urba oficejo por edukado, kulturo kaj sporto**, kiu en sia dokumento de la 8-a de decembro 2014 skribis: "*Ni informas vin, ke kun aparta atento ni pritraktis vian peton por kovri partoprenkostojn*

de la lernantoj de via lernejo en la internacia konkurso de lernejoj kantkorusoj en Esperanto, kiu okazos en majo 2015 en Vroclavo, Pollando. Lige al tio ni informas vin, ke la Urba oficejo por edukado, kulturo kaj sporto, konforme al la alkoĉita spezlito, atribuas al vi la sumon de 20.000 kunaĵoj".

La polaj organizantoj kaj esperantistoj de Vroclavo organizis por la korusanoj ankaŭ turisman programon. **Grandan dankon al ĉiuj!**

ORNITOLOGIA RIĈAĴO DE KROATIO

Dum la unua Adriatika Feriado, okazinta en Prvić Luka inter la 2-a kaj 10-a de aŭgusto 2013, mi prezentis kelkajn faktojn pri birdoj kaj naturlokoj de Kroatio. Per ĉi tiu teksto mi volas sciigi la legantojn de "Zagreba Esperantisto" pri tiu interesa temo.

En Kroatio ĝis nun oni registris 375 birdospeciojn, el kiuj 231 nestas en Kroatio, kio estas granda parto de la eŭropa mezumo. Tiu ĉi lando kun milda klimato kaj abunda naturo estas ŝata vivloko por multaj birdoj. Koncerne la protektadon de animalaj specioj Kroatio estas unu el la plej gravaj landoj en Eŭropo.

Kvankam birdojn oni povas observi dum la tuta jaro, la plej taŭgaj sezonoj por observado estas printempo kaj aŭtuno, kiam okazas birdomigradoj. La specioj, kiuj nestas en Kroatio, aŭtune foriras, kaj anstataŭe venas la birdoj el norda Eŭropo kaj Azio. Printempe la specioj, kiuj pasigas vintrojn en pli varma klimato de Afriko, revenas Kroatien por nesti. Kroatio estas nepre trapasebla loko en la migranta itinero al kaj el Afriko por granda nombro da eŭropaj birdospecioj.

Plej bona tempo por observi birdojn estas frumatene kaj frupesere. Por spekti birdojn oni bezonas bonkvalitajn binoklojn aŭ etan teleskopon kaj manlibron, kiu klasifikas birdojn laŭ specioj. Oni ankaŭ profitos havante bonan fotilon kaj taŭgajn vestaĵojn. Dum observado oni devus eviti brilajn kolorojn, kiuj timigas la birdojn.

Desegnaĵoj de kelkaj birdospecioj, kies habitato (alinome vivejo) troviĝas en Kroatio, aperis sur poŝtmarkoj, eldonitaj de Kroata Poŝto (vidu la ĉi-suban tabelon). Ankaŭ kroata monero de unu kunaŭo prezentas bildon de bele kantanta birdo.

Dum mia vizito al Kroatio mi observis birdojn kaj faris fotojn en jenaj lokoj:

– sur la insulo Prvić (en la vilaĝoj Prvić Luka kaj Prvić Šepurine) apud Ŝibenik <http://www.prvic-luka.com/gdje.htm>

– en la Nacia parko Kornati (insularo) <http://www.kornati.hr/>

– en la birda naturrezervejo ĉe Vransko Jezero <http://www.pp-vransko-jezero.hr> apud Pakoŝtane, duonvoje inter la urboj Ŝibenik kaj Zadar



Adam Wilkus

Jen listo de aliaj naturlokoj, kie vi povas renkonti foje eĉ eksterordinarajn birdojn: **Falkcentro** (Sokolarski centar) apud Ŝibenik, **Naturparko Velebit** (montaro), **Nacia parko Paklenica** (rokoj), **Naturparko Učka** (montoj), insulo **Pag** (marĉoj), **Naturparko Telaŝĉica** (golffeto), **Nacia parko Krka** (rivero, akvolofaloj), **Nacia parko Lagoj de Plitvice** (lagoj, akvolofaloj), **Naturparko Lonjsko Polje** (vadejoj de rivero Lonja) sudoriente de Zagrebo, **Naturrezervejo Crna Mlaka** (malsekejo), okcidente de la ĉefurbo de Kroatio, montopinto **Sljeme / Medvednica** apud Zagrebo,

KROATAJ POŝTMARKOJ KAJ MONERO KUN BIRDAJ DESEGNAĴOJ (latine – kroate – Esperante)

Poŝtmarko de 40 kroataj dinaroj:
Poŝtmarko de 550 kroataj dinaroj:
Poŝtmarko de 5,00 kunaŭoj:
Kvar poŝtmarkoj de 5,00 kunaŭoj:
Kvar poŝtmarkoj de 5,00 kunaŭoj:
Poŝtmarko de 5,00 kunaŭoj:
Poŝtmarko de 3,10 kunaŭoj:
Monero de 1 kunaŭo:

Monticola solitarius – stjenjak modrokos – blua rokurdo
Halieetus albicilla – orao ŝtekavac - blankvosta maraglo
Ciconia ciconia - bijela roda - blanka cikonio
Platalea leucorodia - ĉaplja žličarka – eŭrazia plataleo (kulerbekuloj)
Ardea Purpurea – ĉaplja danguba – purpura ardeo
Sterna albifrons – mala ĉigra – malgranda ŝterno
Falco eleonorae – eleonorin sokol – eleonora falko/kliffalko
Luscinia megarhynchos – mali slavuj – komuna najtingalo



kie vivas multaj birdoj, regiono de **Dubrovnik**, insuloj de **Kvarnera Golfo** (Cres, Krk, Pag, Lošinj kaj precipe insulo Rab), delto de la rivero **Neretva**, **Naturparko Kopački rit** apud Osijek kaj aliaj.

Dum la unua Adriatika Feriado ni vizitis kelkajn el la nombritaj lokoj. La ceterajn mi intencas viziti dum venontaj vizitoj al Kroatio.

Jen pli detalaj priskriboj de kroataj naturlokoj, en kiuj oni povas observi interesajn birdojn.

FALK-CENTRO

Sokolarski centar (Falk-centro) troviĝas nur 8 kilometrojn for de la urbocentro de Šibenik en larĝa pinia arbaro (Dubrava), kie vizitantoj povas ĝui la misteran vivon de falkoj dum la tuta jaro.

VRANSKO JEZERO

Vransko jezero estas la plej granda, sed malprofunda lago, kiu najbaras Adriatikan maron. Kiam estas malalta nivelo de akvo en la lago pro seka vetero, la lagon enfluas la sala marakvo kaj miksiĝas kun la dolĉa lagakvo. Tio ebligas la vivadon al birdaj specioj, ŝatantaj kaj dolĉan kaj

salan akvojn. La lago situas inter Šibenik kaj Zadar, pli precize ĉe Draga kaj Pakoštane (kie estas la naturrezervejo), sufiĉe proksime al Biograd. La vizitantoj povas observi birdojn promenante laŭ kelkajn kilometrojn longa ligna ponteto, kiu zigzagas tra apudlagaj marĉoj en la naturrezervejo ĉe Pakoštane. Apud la lago kreskas multaj plantoj, kaj oni kultivas vinberojn, olivojn kaj aliajn fruktarbojn. Vizitindas ankaŭ la arkeologia trovejo de antikva preĝejo Crkvine, verŝajne parto de iama setlejo, kiu situas apud la naturrezervejo ĉe la lago.

Apud Vransko jezero vivas **purpura ardeo** (latine: *Ardea purpurea* – kroate: ĉaplja danguba; crvena ĉaplja), **granda botaŭro** (*Botarus stellaris* – bukavac), **kreks** (*Crex crex* – kosac), **ralardeo** (*Adreola ralloides* – žuta ĉaplja), **granda egretardeo** (*Egretta alba* – velika bijela ĉaplja), **marĉa cirkuo** (*Circus aeruginosus* – eja moĉvarica), **malgranda porzano** (*Porzana parva* – siva ŝtjoka), **makula porzano** (*Porzana porzana* – rida ŝtjoka), **nigra fuliko** (*Fulica atra* – liska), **tamarika grilbirdo** (*Acrocephalus melanopogonje* – crnoprugasti trstenjak), **pigmea kormorano** (*Phalacrocorax pygmaeus* – mali vranac), **kolombfalko** (*Falco columbarius* – mali sokol), **malgranda egretardeo** (*Egretta garzetta* – mala bijela ĉaplja) kaj aliaj. Inter ili estas multaj endanĝerigitaj specioj de Eŭropo.



NACIA PARKO KORNATI

La arkipelago de **Nacia parko Kornati** estas formita el ĉirkaŭ 90 insuloj, insuletoj kaj rifoj, kiuj etendiĝas inter Biograd kaj Šibenik. Ĝi estas grava birda areo, kvankam ornitologie estas nesufiĉe esplorita kompare kun la tiea marfaŭno kaj flaŭro. Tie oni povas spekti **strigojn**, **mevojn** kaj la **tufkormoranojn** (*Phalacrocorax aristotelis* – morsi vranac). La vizitoj al Kornati okazas per propraj ŝipoj aŭ per turismaj ekskursoj el Šibenik, Murter, Zadar, Biograd kaj aliaj urboj kaj insuloj.



En la insularo vivas ankaŭ **apusoj** (*Apus apus* – crna ĉiopa) – birdoj kiuj plejparton de sia vivo flugas en la aero kaj havas gambojn bone uzeblajn por teni sin sur roko, sed malutilajn por paŝado surtere. La greka nomo *apuso* signifas *sen piedoj*. Ĉiujn vivfunkciojn (manĝadon, dormadon, seksumadon) tiuj birdoj kapablas fari flugante en aero. Ili manĝas insektojn. Laŭaspekte ili similas al **hirundoj**, sed atentema observanto rimarkos diferencojn en ilia korpoformo.

Aliaj birdoj, kiujn mi vidis ĉe unu el la insuloj, estis **nigraj kormoranoj** (*Phalacrocorax carbo* – veliki vranac). Tiuj birdoj manĝas fiŝojn. En la pasinteco

homoj uzis kormoranojn kiel helpon dum fiŝkaptado. Ĉar la plumaro de kormorano malsekiĝas kiam la birdo subakviĝas (male al la anasoj, kies plumaro ĉiam estas seka), la kormoranoj post plonĝo staras sur rokoj kun etenditaj flugiloj, sekigante la plumaron.



NACIA PARKO KRKA

Tiu Nacia parko troviĝas en la regiono de la rivero Krka apud Ŝibenik. Oni esploris 221 birdospeciojn en la parko, kio prezentas 56% de la ornitofaŭno de Kroatio. Speciale vidindaj estas 80 specioj, kiuj nestas en la parko. La areo de Krka estas tre grava parto de la itineroj de migrantaj birdoj. Plej interesaj estas endanĝerigitaj kaj maloftaj birdoj **balkanfalko** (*Falco biarmicus* – krŝki sokol), **migra falko**, alinome **pilgrima** aŭ **vaga falko** (*Falco peregrinus* – sivi sokol), **serpentaglo** (*Circaetus gallicus* – zmijar), **granda botaŭro** (*Botarus stellaris* – bukavac), **stepalaŭdo** (*Melanocorypha calandra* – velika ŝeva) kaj **mallongfingra alaŭdo** (*Calandrella brachydactyla* – kratkopresta ŝeva). Troveblas tie ankaŭ endanĝerigitaj **pigma kormorano** (*Phalacrocorax pygmaeus* – mali vranac), **reĝa aglo** aŭ **oraglo** (*Aquila chrysaetos* – suri orao), **nizaglo** (*Hieraetus fasciatus*

– prugasti orao), **kolombfalko** (*Falco columbarius* – mali sokol), **malgranda porzano** (*Porzana parva* – siva ŝtjoka), **makula porzano** (*Porzana porzana* – rida ŝtjoka).

La plej grandaj birdaroj videblas printempe kaj aŭtune, dum la periodoj de migrado (150 specioj). Dum ĉi tiuj periodoj la humidejoj (malsekejoj) kaj akvaj habitatoj fariĝas hejmo por **noktardeo** (*Nycticorax nycticorax* – gak), **ralardeo** (*Ardeola ralloides* – žuta ĉaplja), **malgranda egretardeo** (*Egretta garzetta* – mala bijela ĉaplja), **nigra fuliko** (*Fulica atra* – liska), **plاتبeka anaso** (*Anas platyrhynchos* – divlja patka), **brunkapa anaso** (*Aythya ferina* – glavata patka), **tufanaso** (*Aythya fuligula* – krunasta patka), **ruĝkapa anaso** (*Netta rufina* – patka gogoljica), **rokanaso** (*Anthya marila* – patka crninka), **pintvostanaso** (*Anas acuta* – patka lastarka).

La rivero Krka estas loko de vintrumado por malofta **tamarika grilbirdo**, alinome **tamarika kanbirdo** (*Acrocephalus melanopogon* – crnoprugasti trstenjak) kaj bela **barboparuo**, alinome **lipharulo**, **barbopanuro** aŭ **panuro** (*Panurus biarmicus* – brkata sjenica).

En la Nacia parko Krka eblas renkonti ankaŭ **abelmanĝulon**



(*Merops apiaster* – žuta pĉelarica) – unu el plej belaj, multkoloraj eŭropaj birdoj, kiu vivas apud rivereto Gaduĉa enfluanta la lagon Prokljan. La "buŝo" de la rivereto estas unu el la plej riĉaj ornitologiaj lokoj en Eŭropo. En la Nacia parko nestas ĉiujare ĉirkaŭ 200 paroj de **abelmanĝuloj**. La birdoj ĉiujare flugas al Afriko tra la itala insulo Sardinio kaj poste revenas al Eŭropo. Kelkaj paroj nestas ankaŭ en mia lando (Pollando), kiu troviĝas inter montaro Karpatoj (Tatroj, Beskidoj) kaj Balta maro.

Sciindas, ke tia loko troviĝas en la parko, sed memoru, ke neniu rajtas ĝeni la birdojn kaj oni eĉ malpermesas alproksimiĝi al la nestoj por ne timigi la birdojn. Uzu vian binoklon anstataŭ veni tro proksimen. La naturo kaj la birdoj estas plej valora trezoro. Eŭropa Unio donas multe da mono por protekti tiujn unikajn kaj endanĝerigitajn birdojn. Do, lasu la birdojn kaj aliajn bestojn neĝenatajn, por ke ankaŭ niaj posteuloj kaj venontaj generacioj povu ĝui la naturon.

Aliaj ornitologiaj lokoj en la Nacia Parko de la rivero Krka estas: fonto-lago de Torak, Roŝki Slap, Ĉulisiĉ-marĉoj kaj parto de Visovac-lago.

NATURPARKO VELEBIT

Velebit estas la plej longa montaro en Kroatio, etendiĝanta 145 kilometrojn de Vratnik (proksime

al Senj) ĝis la rivero Zrmanja (proksime al Zadar). En ĝi troviĝas tri parkoj: Nacia parko de Norda Velebit, Naturparko Velebit kaj Nacia parko Paklenica. Ĝi havas du striktajn naturrezervejojn (ambaŭ en la Nacia parko de Norda Velebit), kaj la regiono estas riĉa je flaŭro kaj faŭno. Tie nestas *paserstrigo* (*Glaucidium passerinum* – mali ĉuk), *hortulano* (*Emberiza hortulana* – vrtna strnadica), *urogalo* (*Tetrao urogallus* – tetrijeb gluhan), *blankdorsa buntpego* (*Dendrocopos leucotos* – planinski djetliĉ) kaj *funebra strigo* (*Aegolius funereus* – planinski ĉuk).

La Nacia parko Paklenica okupas la marbordan (sudan) parton de Velebit. La Parko estas fama pro la granda altecdiferenco, kiun oni trapasas veturante tra ĝi, spertante ŝanĝon de klimatoj sur relative malgranda areo. Sur la roko kaj klifoj oni povas vidi *rokan siton* (*Sitta neumayer* – brgljez kamenjar) kaj *bluan rokturdon* (*Monticola solitarius* – modrokos).

NATURPARKO UĈKA

La Naturparko Uĉka okupas la monton Uĉka kaj parton de la monto Ĉićarija en Istrio. Nemultaj esploroj estis faritaj pri la tiea birdo vivo, kvankam oni scias, ke la *reĝa aglo* (*Aquila chrysaetos* – suri orao) tie havas siajn nestojn, dum la *ansergrifon* (*Gyps fulvus* – bjeloglavi sup) oni povas fojfoje ekvidi sur la klifoj.



INSULO PAG

La insulo Pag estas hejmo de birdaj rezervejoj *Kolansko blato* kaj *Velo blato*. Ambaŭ estas marĉoj, kiuj fariĝis hejmo al *knaranaso* (*Anas strepera* – patka kreketaljka), *griza cirkuo* (*Circus pygargus* – eja livadarka) kaj *stepalaŭdo* (*Melanocorypha Calandra* – velika ŝeva), birdspecioj endanĝerigitaj en Eŭropo.



NATURPARKO TELAŠĆICA

Tiu grandioza naturparko en la golfeto Telašćica ĉe la insulo Dugi Otok estas hejmo por 110 birdspecioj. Ŝajne la plej interesaj tie estas rabobirdoj, ekzemple *migra falko* (*Falco peregrinus* – sivi sokol), birdspecioj endanĝerigitaj en Eŭropo).

LA KAMPO DE LONJA

La kampo de Lonja (Lonjsko polje) estas granda marĉa areo, la plej vasta naturparke

protektata malsekejo, ne nur en Kroatio, sed en la tuta baseno de la rivero Danubo. Ĝi estas unika plantkaj birdorezervejo. Tie oni povas vidi plej multajn *cikoniojn* en Kroatio. Sur la kampo estas nombrigitaj 250 birdspecioj, el kiuj 134 nestas tie. Neforgeseblaj estas ekskursoj per fiŝistaj boatoj al Ĉigoč, la eŭropa vilaĝo de cikonioj aŭ al ornitologia rezervejo Krapje Dol, kie oni povas vidi tipe lokajn birdojn, ekz. kulerbekulojn t.e. birdojn kun beko kulerforma. La naturparko kovras 506 kvadratajn kilometrojn. Ĝi situas oriente de rivero Sava, okupas la basenon de rivero Lonja (kiu donas al ĝi la nomon), kaj laŭlonge de la rivero Strug atingas la urbon Nova Gradiška. La parko troviĝas proksime al vizitinda urbo Sisak, la regiona ĉefurbo kun 2500-jara historio, kie troviĝas malnova fortikaĵo, fama pro bataloj kontraŭ turkoj.

CRNA MLAKA

Crna Mlaka estas marĉa arbaro kun vastaj frajejoj kaj rezervejo en kiu estas protektitaj marĉbirdoj. Ĝi estas granda ebenaĵo, kovrita per kverkaj arbaroj. Eksterordinara birdospeca riĉeco de ĉi tiu loko estas eŭropa kaj monda valorajo. Tie oni povas renkonti protektitajn kaj maloftajn birdojn, ekzemple *blankvostan aglon*, *kormoranon*, *nigran cikonion* (*Ciconia nigra* – crna roda), *tufgrebon* (*Podiceps*



cristatu – ĉubasti gnjurac), *ardeon*, diversajn speciojn de anasoj ktp. Ornitologoj en Crna Mlaka rimarkis eĉ 230 birdospeciojn. Tiu ornitologia rezervejo de 6,87 kvadrataj kilometroj estas speciale protektita. Ĝi kuŝas inter Jastrebarsko (14 km), Karlovac kaj Jamnička Kiselica. En Pokupsko, la plej malalta parto de la baseno, antaŭ tridek jaroj oni konstruis lageton, kiu estas ankoraŭ uzata.

MEDVEDNICA

La monto Medvednica kun sia pinto Sljeme kuŝas apud Zagrebo. La ĉielon super la fortikaĵo Medvedgrad regas rabobirdoj, inter kiuj plej multas *komuna buteo* (Buteo Buteo – obiĉni ŝkanjac), *falko* (Accipiter gentilis – jastreb), *turfalko* (Falco tinnunculus – vjetruŝa) kaj *akcipitro* (Accipiter nissus – obiĉni kobac). Speciale granda plezuro estas vidi la maloftan *vespobuteon* (Pernis apivorus – ŝkanjac osaŝ). La plej ofta kantobirdo sur Medvednica estas *fringo* (Fringilla coelebs – zeba) kaj *robino* (Erithacus rubecula – crvendaĉ). Krome ekzistas oftaj *paruoj*, kiuj kolektiĝas dum vintro en grandaj aroj, konsistantaj el pluraj malsamaj tipoj, ekzemple *granda paruo* (Parus major – velika ŝjenica).

INSULO PRVIĆ

Birdoj, kiujn mi observis sur la insulo Prvić (en la vilaĝoj Prvić Luka kaj Prvić Šepurine) apud Ŝibenik estis *mevoj (laroj)*, *hirundoj*, *paseroj*, kaj tre interesa *noktuo* (Athene noctua – sivi ĉuk), kies voĉon ni aŭdis vespere apud nia hotelo.

LA INSULOJ DE KVARNERO

La ĉefaj insuloj en la Kvarnera golfo estas Cres, Krk, Pag, Rab kaj Loŝinj. Estas du

birdorezervejoj ĉirkaŭ la insulo Krk, sed ambaŭ sufiĉe malfacile atingeblaj. La unua troviĝas sur la neloĝata insulo Prvić, atingebla nur per boato el Baŝka sur la insulo Krk. La alia estas Kuntrep sur la insulo Krk, atingebla per boato, aŭtomobilo aŭ piede. Inter la plej gravaj loĝantoj de la Kvarnera insularo estas *ansergrifo* (Gyps fulvus – bjeloglavi sup). La vulturoj videblas sur klifoj, kiuj leviĝas super la maro. Estas vere grave ne veni tro proksimen, ĉar motora aŭ voĉbruo timigas junajn birdojn, kiuj povas fali en la maron kaj droni.

Du rezervejoj ekzistas ankaŭ sur la insulo Cres: Fojiŝka – Podpredošćica (en norda parto de la insulo) kaj Mali Bok – Koromaĉna (en orienta parto de la insulo). Ili estas la plej gravaj habitatoj de *ansergrifo* sur la Kvarneraj insuloj.

La insulo Rab konservis valorajn kulturajn pejzaĝojn kreitajn de homoj, ekzemple olivboskojn, vinber- kaj fruktoĝardenojn, kampojn kaj paŝtejojn. Ili pliriĉigas la pejzaĝon kaj biologian diversecon de Kroatio, sed por protekti la naturon ili ne povas esti ignorataj, ĉar ili ne estas plene naturaj habitatoj por birdoj kiel arbaroj, marĉoj aŭ montoj. Intensiĝo de agrikulturo kaj brutobredado draste ŝanĝis la pejzaĝon en Eŭropo, pro kio faŭno kaj flaŭro asociitaj kun tiaj vivejoj estas nun ekstreme vundeblaj.

La rokaj paŝtejoj en la mediteranea areo draste reduktiĝis, kaj sur la insuloj de Kvarnero oni trovas la lastajn grandajn paŝtejojn

por ŝafoj kaj aliaj brutoj. Ĉar tiuj paŝtejoj ne estas traktataj per mineralaj sterkaĵoj kaj pesticidoj, ili servas kiel rifuĝejo por endanĝerigitaj flaŭro kaj faŭno, kiuj antaŭe estis tre disvastiĝintaj.

Sur la insulo Rab, oni protektas la birdospeciojn, kiuj dependas de malfermaj areoj kiel *malgranda turfalko* (Falco naumanni – bjelonoĉka vjetruŝa), kies lasta konata nestejo en Kroatio troviĝas sur tiu insulo. Ĉi-tie vivas ankaŭ aliaj endanĝerigitaj birdospecioj, kiel ekzemple: *ansergrifo* (Gyps fulvus – bjeloglavi sup), *serpentaglo* (Circaetus gallicus – zmijar), *orelstrigo* (Asio otus – mala uŝara), *arbalaŭdo* (Lullula arborea – ŝeva krunica), *sablopipio* (Anthus campestris – primorska trepteljka), *noktuo* (Athene noctua – sivi ĉuk) kaj *kaprimulgo* (Caprimulgus – leganj).

Nestado de *malgranda turfalko* estas draste endanĝerigita. Tiujn birdojn oni konsideris formortintaj dum la lastaj kvar jardekoj en la kroata teritorio. Tamen, la membroj de Naturasocio BIOM malkovris en 2010 la antaŭe nekonatan kolonion de tiu specio sur la insulo Rab. La kolonio konsistas el ĉirkaŭ 20 reproduktaj paroj.

Kontraste al la *ordinara turfalko* (Falco tinnunculus – vjetruŝa), *malgranda turfalko* estas ege sociema se temas pri manĝaĵo kaj nestolokoj. Ĝi migras en grupoj de dek ĝis pli ol cent birdoj. Ĝia ĉefa manĝaĵo konsistas el grandaj insektoj, ekzemple lokustoj. Ĝi vintras en la subsahara Afriko, kaj en Kroatio restadas nur inter aprilo kaj aŭgusto, logita al la vastaj paŝtejoj, sur kiuj oni ne uzas pesticidojn.

BIOM vigligis la kolonion de *malgranda turfalko* en Kroatio, kaj esploras ĝian fenologion de nestado kaj migrado (t.e. sciencan, kiu rilatas al la klimato kaj biologiaj fenomenoj, kiuj okazas laŭperiode, alivorte evolufenomenojn, kiuj



periode revenas en la naturo dum la jarcirklo kiel ekzemple birdomigrado, florado/ekfloro de vegetalaj ktp). Bazite sur la **malgranda turfalko** oni elektis la insulon Rab kiel pilotan areon de internacia projekto *Flugiloj tra Balkanio*, financata de Eŭropuniaj fondusoj. BIOM realigis ankaŭ la projekton *Natura Rab*, financatan de la Ministerio pri kulturo, kies celo estas renkontigi la lokan komunumon kun la koncernatoj de la Eŭropa ekologia reto *Natura 2000*.

La reto *Natura 2000* estas ekologia reto de areoj por konservado de biodiverseco en Eŭropa Unio. Ĝia celo estas certigi por longa tempo travivadon de la specioj kaj habitatoj plej minacataj en Eŭropo, haltigante perdon de biodiverseco, kiu rezultis el la kontraŭefiko de la homa agado. Ĝi estas la ĉefa ilo por konservado de la naturo en Eŭropa Unio. Tiu reto de kongruaj areoj baziĝas sur la politiko de naturkonservado en Eŭropa Unio laŭ ĝia Direktivo pri Habitatoj, kiu komplementas la Direktivon pri Birdoj el 1979.

DUBROVNIK

La insuletoj Mrkan, Bobara kaj Supetar estis deklaritaj specialaj birdorezervejoj en 1975 pro sia graveco kiel nestolokoj por granda nombro de **flavkrura mevo** (*Larus michahellis* – sredozemni galeb) kaj **kaspia mevo** (*Larus cachinnans* – galeb klaukavac). Tiuj insuloj, konataj kiel insularo

de Cavtat, situas en Suda Adriatiko ĉe la enirejo al Golfo de Župa. Ĝi situas proksimume 2 kilometrojn de Cavtat. Aliaj birdospecioj videblaj tie estas: **tufkormorano** (*Phalacrocorax aristotelis* – morski vranac), **upupo** (*Upupa epops* – pupavac), **ruĝpieda falko** (*Falco vespertinus* – crvenonoga vjetruša), **alpa apuso** (*Apus melba* – bjela ĉiopa), **nigrakapa emberizo** (*Emberiza melanocephala* – crnoglava strnadica), **nigrakapa silvio** (*Sylvia melanocephala* – cnoglava grmuša), **serpentaglo** (*Circaetus gallicus* – zmijar).

LA DELTO DE NERETVA

La delto de la rivero Neretva estas grava birda areo kaj unu el la kvar protektotaj marĉaj lokoj de *Ramsar* en Kroatio. Proksime al Metković troviĝas birdaj rezervejoj Pod gredom, Orepak kaj Prud, kaj speciala birda kaj fiŝa rezervejo situas en la sudorienta parto de la delto.


Ramsar-Interkonsento estas konvencio pri malsekaj regionoj havantaj internacian gravecon, precipe por akvobirdaj vivejoj. Ĝi estas internacia traktato por konservado kaj daŭrigebla utiligo de malsekaj regionoj, rekonante la fundamentajn ekologiajn funkciojn de malsekejoj kaj iliajn ekonomiajn, kulturajn, sciencajn kaj distrajn valorojn. Krom rekono de la valoroj, ĝia nuntempa celo estas haltigi la progreseman atakon al kaj perdon de malsekaj regionoj. Ĝi estas nomita laŭ la urbo Ramsar

en la irana provinco Mazandarano, kie reprezentantoj de multaj landoj subskribis la interkonsenton en 1971 kaj poste ankaŭ aliaj aliĝis. Aktuale ekzistas 160 kontraktantoj. La *Ramsar-Interkonsento* intense kunlaboras, interalie, kun la internacia organizaĵo *BirdLife International*, dediĉita al protektado de birdoj kaj iliaj medioj.

LA REGIONO DE OSIJEK

Vizitante Osijek nepre vizitu la Naturparkon Kopački rit. Ĝi estas inunda ebenaĵo de du grandaj riveroj: Danubo kaj Drava. Kopački rit estas unu el la kvar marĉaj lokoj de *Ramsar* en Kroatio, riĉa je flaŭro kaj faŭno. Ĝi estas grava natura heredaĵo en la nacia kaj eŭropa niveloj. Tie ekzistas speciale riĉa birda kolonio, kun la plej granda nombro de nestolokoj de **blankvosta aglo** (*Haliaeetus albicilla* – orao ŝtekavac aŭ bjelorepan) en tiu parto de Eŭropo kaj la plej multnombraj kolonioj de **kormoranoj kaj ardeoj** en Kroatio. Ĉe la rivero Drava vivas interalie **hirunda ŝterno** (*Sterna hirundo* – crvenokljuna ĉigra), **malgranda ŝterno** (*Sterna albifrons* – mala ĉigra), **grenokanbirdo** (*Acrocephalus palustris* – trstenjak mlakar), **granda kormorano** (*Phalacrocorax carbo* – veliki vranac, alinome veliki kormoran) kaj aliaj.





ROMANO PLI PSIKOLOGIA OL KRIMA

Julian Modest

*Ricarda Huch: La lasta somero.
El la germana tradukis Reinhard Haupenthal.
Eld.: Edition Iltis 2009. p. 107*

En la enkonduko de la libro “La lasta somero” de Ricarda Huch, la tradukanto Reinhard Haupenthal skribis, ke la libro estas “letera krim-romano, kio gartantiis ĝian ŝatecon ĉe la adoleskaj legantoj.”

Mi ne emas kaj evitas legi krimromanojn, kiuj estas precipe ŝatataj ĉe adoleskuloj, tamen mia scivolemo igis min eklegi la libron kaj jam de la unuaj paĝoj mi konstatis, ke ne temas pri ordinara krimromano kun konataj suĝeto kaj herooj, sed pri pli serioza kaj pensiga verko.

La leterformo de la romano vekas la intereson de la legantoj kaj laŭ mi la ideo de la verkistino rakonti la historion pere de la leteroj de la roluloj en la verko, estis ege trafa. Tiel Ricarda Huch sukcese realigis kelkajn tre gravajn premisojn por la allogo de la enhavo kaj la arta efiko de la beletro. La leteroj de la roluloj kaŭzas la streĉon ĉe la legantoj kaj detale prezentas la heroojn de la libro, iliajn emociojn, meditojn, agojn. La aŭtorino restas tute kaŝita malantaŭ siaj herooj, kiuj mem ekstaras antaŭ la legantoj.

Ne necesas mencii, ke la letero estas la plej sincera kaj la plej intima formo de komunikado. En la

letero, direktita al difinita persono, oni konfesas siajn plej profundajn kaj plej kaŝitajn travivaĵojn, dubojn, konstatojn, emociojn.

La roluloj en la romano korespondas unu kun alia kaj per siaj leteroj montras kion ili sentas al aliaj roluloj, siajn pritaksojn pri ili, konkludojn pri iliaj agoj kaj eldiroj. Pere de la leteroj Ricarda Huch ege lerte priskribas kaj karakterizas la heroojn. La aŭtorino skizas ne nur iliajn portretojn, sed talente psikologie karakterizas ilin. Ekzemple en unu el siaj leteroj la revoluciulo Lju trafé desegnas la portreton de gubernestro Jegor de Rasimkara. “*Mi observis tiun parton de lia vizaĝo turnitan al mi; la larĝajn nigrajn brovojn – signon de forta vitalo – la akre kurban nazon, ĉiu-linie troviĝas fajro kaj noblo.*”

Tiel Lju kaj la legantoj vidas la gubernestron, tamen la aŭtorino detale pentras ankaŭ lian psikan portreton per la leteroj de la aliaj roluloj. Welja, la filo de la gubernestro, skribas al sia fratino Katja: “*Paĉjo estas la sola, neniel ŝancelebla. Nul ombro de timo enestas en li; pli frue ankoraŭ eblis cedi, sed nun li neniel cedos. Komprenible enestas eĉ spito, obstino kaj pravemo, sed tamen ne mankas al li superbo.*”

Lju ekloĝas en la somera domo de la gubernestro Jegor de Rasimkara por esti lia gardisto, ĉar la gubernestro estas minacata.

La revoluciuloj planas murdi lin kaj Lju havas la taskon plenumi la mortverdikton.

Lju same estas subtile karakterizita el diversaj vidpunktoj. El la leteroj de la roluloj en la romano la legantoj komprenas, ke Lju estas saĝa, inteligenta kaj lia personeco ravas ĉiujn, tamen dank’ al sia ina intuicio Katja, la filino de la gubernestro, suspektas, ke Lju ne estas tia, kian li prezentas sin kaj ŝi skribas al Welja: “*Efektive, kion mi scias pri Lju? Mi certas, ke li absolute senskrupulas.*”

La patrino de Katja, Lusinja, same malfacile povas difini kia homo estas Lju, sed ŝi ne tre maltrankviliĝas. “*Mi jam pensis, ke en lia vivo povus ekzisti sekretoj trudantaj sinretenon; sed tio ne maltrankviligas min, ĉar mi certas, ke ne temas pri io vulgara.*”

La verkistino ebligas al la legantoj ekkoni Lju ankaŭ el la leteroj, kiujn li mem skribas al Konstanteno, sia komplico. El tiuj ĉi leteroj ni vidas viron, kiu firme decidis plenumi sian taskon, murdi la gubernestron. Lju eĉ por momento ne hezitas, ne ŝanceliĝas. Li firme kredas, ke tio estas lia misio, lia celo kaj li ne havas timon. Li filozofie meditas pri la vivo: “*Ke ĉio kondamniĝas al perejo en la momento de la ekesto, jen la sola tragiko en la vivo; ĉar tio estas la esenco de la vivo, ĉar alian vivon ni neniam havos.*”

“La lasta somero” montras, ke Ricarda Huch estas talenta verkistino. En la romano pere de la rilatoj en la gubernestra familio, kiu pasigis mallongan someron ekster Peterburgo, la aŭtorino prezentis unu el la plej dramecaj historiaj eventoj en Rusio en la komenco de la dudeka jarcento. La verkistino pentris ne nur reliefaĵajn homajn karakterojn,

sed ŝi aludis la rusan atmosferon tiutempan, la slavan pensmanieron kaj laŭ mi tio estas la plej granda valoro de la romano.

Mi persone ŝatus danki al Reinhard Hauptenthal, kiu tradukis la romanon en Esperanton, ĉar se ne estus tiu ĉi traduko, mi certe neniam tralegus tiun ĉi romanon, kiu vere impresis min. La traduko estas brila. Per la stilaj ebloj de Esperanto,

Hauptenthal sukcesis transdoni la subtilajn sentojn, meditojn, rezonojn de la roluloj.

La romano ŝajnas krimromanon, sed ĝi estas psikologia, ĉar detale prezentas pensmanieron, ideojn, homan sintenon, sukcese interpretitajn per la riĉeco de Esperanto dank’ al la tradukista talento de Reinhard Hauptenthal.

SINCERAJ EMOCIAJ RAKONTOJ Julian Modest

Nikola Uzunov: Krepuskiĝo.

Kolekto de originalaj poemoj kaj noveloj. 2015. p. 40. Prezo: 5 eŭroj.

La libro “Krepuskiĝo” de Nikola Uzunov enhavas Esperantajn poemojn kaj rakontojn. La poemoj estas dediĉitaj al Zamenhof, al la 9-a Festivalo de BEJ en urbo Haskovo, al la geesperantistoj, kiuj daŭrigas kuraĝe la ideojn de d-ro L. Zamenhof.

*“Memoras ni batojn kaj sorton kruelan,
memoras malvenkojn en sorta fatal’.
Sed tamen ni iras sur voj’ senŝancela
kuraĝe levigas ni post ĉiu fal!’”*

(“Ni marŝas por paco”)

La rakontoj en la libro montras la emociion kaj sincerecon de la aŭtoro. En la rakonto “La maljuna instruisto” N. Uzunov priskribas la malfeliĉan sorton de bulgara instruisto pensiulo, kiu vivas mizere. La mono ne sufiĉas kaj la iama instruisto de kemio por manĝi prenas ĵetitajn panon el rubujo. Tiu ĉi trista rakonto respegulas la nunan vivon en Bulgario. Homoj, kiuj laboris dum sia tuta vivo kaj honeste perlaboris sian panon, post la pensiigo restas sen rimedoj, malsatas kaj mizeras.

Plurajn rakontojn Uzunov dediĉas al Esperanto. En la antaŭparolo de la libro li konfesas: “Ĉar Esperanto donis al mi multon, ĝi ankaŭ postulas de mi doni mian sperton, talenton kaj fortojn por la prospero de la nobla kaj bela lingvo, kiu havas estontecon.” En la rakontoj “Unuaj paŝoj en Esperanto”, “Miaj Esperanto-instruistoj”, “La helpanto de Andreo Ĉe” la aŭtoro rakontas kiel kaj kiam li komencis lerni Esperanton, kiuj estis liaj Esperanto-instruistoj kaj kiel li konatiĝis kun la fama Esperanto-instruisto Andreo Ĉe.

La Internacia Lingvo alportis al Uzunov ne nur pozitivajn kaj agrablajn emociojn. Kiam li estis soldato kaj kiam li eklernis Esperanton, li komencis korespondi. Tiam li ricevis leteron el Brazilo, kiu kaŭzis al li malagraban travivaĵon. La vickomandanto pri politika sekureco de regimento, vickolonelo Benov, vokis lin kaj lian amikon Petro Todorov, same soldato tiam, kaj severe riproĉis ilin, ke ili korespondas en flingvo kun faŝistoj kaj kapitalistoj. Post tiu ĉi malagraba travivaĵo Nikola Uzunov kaj Petro Todorov decidis ne plu okupiĝi pri Esperanto en la kazerno.

En la libro estas aliaj interesaj rakontoj kiel “Norma”, “La entrudulo”, “Nataŝa”. En “Nataŝa” Uzunov rakontas pri rusa knabino ĉiĉeronino, kiu studis ĵurnalistikon. Ŝi rakontis al Uzunov, ke ŝi loĝas kun sia patrino kaj ne konas sian patron. La patro de Nataŝa estis persekutita de tiama Nacia komitato pri internaj aferoj dum la Stalina reĝimo kaj malaperis senspure, kiam ŝi estis dujara.

Per la tristaj rememoroj de Nataŝa, Uzunov emocie rakontas pri la obskuraj jaroj, kiam Stalin persekutis senkulpajn personojn nur pro la suspekto, ke ili agis kontraŭ la soveta ŝtato. Oni sendis ilin al Siberio, de kie ili neniam revenis.

Nataŝa ekintersiĝis pri Esperanto kaj Uzunov rakontis al ŝi pri la Internacia Lingvo kaj menciis, ke dum la tempo de Stalin estis persekutitaj same multaj eminentaj sovetaĵ geesperantistoj.

La rakontoj en “Krepuskiĝo” estas verkitaj en modela Esperanto kun alloga enhavo. El ili radias la homeco kaj bonanimo de la aŭtoro, kiu scipovas rakonti klare kaj kompreneble.



Redakcia kompilo

Josip Pleadin, Anita Res kaj Ivana Pavlečić elektas la ilustraĵojn



LA DUA VERKO DE MATO LOVRAK TRADUKITA EN ESPERANTON

Mi ricevis la aŭtorajn ekzemplerojn de “La trajno en la neĝo” en Esperanto kaj mi dankas pro via sendaĵo.

Mi estas ravita!!! Jam longe mi ne havis en la mano “veran” libron, reprezentan, lukse eldonitan, kun malmola bindaĵo. Ĝi estas librego!

Estis bonega ideo de la eldonistoj fari la ilustradon per infanaj pentraĵoj. La ideo estas bonega, la desegnaĵoj eĉ pli bonaj! Multaj profesiaj ilustristoj farus tion malpli kvalite. Ĉi tiu afero estas vere sukcesa!

La eldono tre pozitive impresis min, diference de nun ofte uzata malmultekosta, malmola bindo, ĉar libro ankaŭ per aspekto kontribuas al sia digno.

Ĉar la libro vojaĝos tra la mondo, ĝi bele prezentos nin!

Mi estas tre kontenta kaj mi gratulas al vi!

Mi ĝojas pro eventuala estonta kunlaboro kaj salutas vin ĝis tiam.

Jagoda Hodak
(nepino de Mato Lovrak)

*Se infanoj konkordiĝas
Tiam forto centobliĝas
Multe kreskas nia povo
se laboras ni kun ĝoj'*

La ĉi-supraj versoj de la konata kroata infankanto senerare respegulas la ideojn pri infana kunlaboro, kamaradeco kaj kolektiva laboro por komuna bono, kiujn tra ĉiu el dudako da siaj libroj diskonigas la kroata porinfana verkisto **Mato Lovrak** (1899-1974). La temojn por siaj verkoj li ĉerpis

el la vilaĝa medio, el kiu ankaŭ li devenas.

Sendiskute liaj du plej gravaj verkoj estas *La kamaradaro de Petro Nodeto* kaj *La trajno en la neĝo*. La unua el ili en Esperanto aperis ankoraŭ en 1998, sed la dua sian presitan Esperantan eldonon ricevis ĉi-jare, apenaŭ 17 jarojn poste. Ambaŭ romanojn tradukis **Josip Pleadin**. La eldono de *La trajno en la neĝo* en Esperanto en multaj detaloj similas la ideojn de la aŭtoro pri utila kolektiva laboro.



Franjo Forjan kaj Radenko Milošević subskribas la kontrakton

La ideo Esperantigi kaj eldoni la duan plej gravan verkon de Mato Lovrak ekzistis jam delonge ĉe la prezidanto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), s-ro **Radenko Milošević**. Tiun ideon refreŝigis Bjelovara Esperantista Societo (DEB), kiu proponis ĝin kiel projekton al Departemento Bjelovar-Bilogora. La projekto, je agrabla surprizo de la proponintoj, estis akceptita, kaj la Departemento atribuis al ĝi certan monsumon. Ankaŭ la monpeto al Komunumo Veliki Grđevac (la naskiĝloko de Mato Lovrak!) rezultis per ioma subvencio, sed ĉio kune ne sufiĉis por kovri la kostojn de la eldono. Tiam la prezidanto de UZE, **Radenko Milošević** proponis, ke UZE estu kuneldonanto kaj kunfinancanto de la verko. La propono estis akceptita de DEB kaj la kontrakto pri tio estis subskribita inter la societaj prezidantoj **Franjo**

Forjan (nome de DEB) kaj **Radenko Milošević** (nome de UZE) en Vrbovec la 13-an de aprilo 2015 .


Jam ĉe la komenco naskiĝis la ideo, ke porinfanan libron, kia estas **La trajno en la neĝo**, plej bele ilustrus la infanoj mem. Por tiu ideo la eldonistoj tuj ricevis subtenon de la direktorino de **Elementa lernejo Mato Lovrak** en Veliki Grđevac, s-ino **Ivana Pavlečić**, kaj la instruistinoj **Marija Čičak** kaj **Anita Res**, kiuj mentoris al la infanoj. La rezulto de tio estis bonegaj infanaj ilustraĵoj por la libro! Post la atenta provlegado de **Tomasz Chmielik** (Pollando), la libro senĝene aperis, kaj ĝia prezento eniris la oficialan programon de la aranĝo **La tagoj de Mato Lovrak**, kiu jam 28 jarojn okazas en Veliki Grđevac. La libroprezento okazis antaŭ 150 gelnantoj la 27-an de majo 2015, kaj la etaj ilustristoj ricevis aŭtorajn ekzemplerojn de la libro el la manoj de la anstataŭantino de la departementestro s-ino **Đurdica Ištef-Benšić**. Krome, ili ricevis lernolibron de Esperanto, kaj ĉiuj ĝoje faris komunan foton antaŭ la ĉefa "rolulo" de la libro – la trajno, kiu staras en la **Memorcentro Mato Lovrak**. Per tiu foto ni ilustras la frontpaĝon de ĉi tiu numero de nia gazeto.

Reage al apero de **La trajno en la neĝo** en Esperanto, UZE ricevis ankaŭ leteron de la ŝtatprezidantino s-ino **Kolinda Grabar-Kitarović**, kaj tre pozitive pri la libro esprimis sin ankaŭ s-ino **Jagoda Hodak**, nepino de la aŭtoro, kiu sian kontenton dividis kun Bjelovara Esperantista Societo.

Pro la sperto akirita per ĉi tiu libro, ni povas nur konfirmi la pravecon de la komencaj versoj, kiuj konstatas, ke per kunlaboro la forto centobliĝas.



La infanoj transprenas la librojn el la manoj de Đurdica Ištef-Benšić





LISTO DE DONACINTOJ 2

- La 15-an de januaro 2015 **Detlev Blanke** el Berlino (Germanio) sendis al DEC la numeron 93 de "Interlinguistische Informationen".

- La 17-an de januaro 2015 **Marija Jerković** el Zagrebo transdonis al DEC la numeron 14/4 de "Internacia Pedagogia Revuo".

- La 20-an de februaro 2015 **Universala Esperanto-Asocio** el Roterdamo (Nederlando) sendis al DEC la numeron 24 (2015:1) de "Esperanto en Afriko".

- La 21-an de februaro 2015 **Vjekoslav Morankić** el Rijeka sendis al DEC 3 fotojn (F-1898, F-1899 kaj F-1900).

- La 23-an de aprilo 2015 **Georgi Mihajlov** el Sofio (Bulgario), donacis al DEC sian verkon "Posteuloj de Ahasvero" (1997).

- La 24-an de aprilo 2015 **esperantisto** el Bukureŝto (Rumanio) donacis al DEC la librojn "Elektita liriko" de Gheorghe Mihail (2012, dulingva: rumana Esperanta) kaj "Fragmentaro" de Valeriu Butulescu (2014, dulingva: rumana kaj Esperanta).

- La 24-an de aprilo 2015 **Georgi Mihalkov** el Sofio (Bulgario) donacis al DEC sian bulgarlingvan verkon "Ĉovekot kojto podarjavaŝe meĉti" (2015).

- La 25-an de aprilo 2015 **Venelin Mitev** el Sofio (Bulgario) donacis al DEC sian poemaron "Somero cigana" (1993).

- La 25-an de aprilo 2015 **Nikola Uzunov** el Jambol (Bulgario) donacis al DEC aron da siaj broŝuroj: "La scienco kaj la Biblio" (2013), "La civilizacioj en la lumo de la Biblio" (2013), "Antaŭsignoj de la lasta tempo" (2013), "La mondfino - ĉu ĝi okazos" (2013), "La arkeo de Noa"

Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac estas la landa Esperanto-arkivo en Kroatio, kiu kolektas ĉiaspecajn materialojn rilatantajn al Esperanto. Listojn de donacintoj DEC publikigis en sia Ipernity-paĝaro, kaj en 2013 ĝi publikigis specialan paperan broŝuron. Por daŭre listigi ĉiujn donacojn, ni enkondukas specialan rubrikon en "Zagreba Esperantisto".

(2013), "Esperanto kiel familia lingvo" (2013), "Influo de slavaj lingvoj en Esperanto" (2013), "Neologismoj en Esperanto" (2013), "Prepozicioj DE kaj EL en Esperanto" (2013), "Tradukado el Esperanto" (2013), "Kantoj en Esperanto el la tuta mondo" (2015) kaj sian verkon "Krepuskiĝo - Kolekto de originalaj poemoj kaj noveloj en Esperanto" (2015).

- La 25-an de aprilo 2015 **Marian Vochin** el Bukureŝto (Rumanio) donacis al DEC la jenajn librojn: "Poŝvortaro Esperanta-rumana kaj rumana-Esperanta" (Ionel Oneț, 2002), "Manual de limba esperanto" (Marian Constantinescu, 2009), "11x11 esperanto prin proverbe - curs minimal" (Aurel Boia, 2006), "Alți pași în Esperanto" (Ionel Oneț, 1997), "Documenti Esperanto" (1997), "Curs elementar de Esperanto" (Ignat Florian Bociort kaj Mioara Lacrima Dobre, 1983), "Către tinerii mei cititori" (Ignat Florian Bociort, 2000), "Din lirica de expresie Esperanto" (Constantin Dominte, 2005), "Eminescu en Esperanto" (2005), "Esperanto - manual de limba internațională" (Zagreba metodo - B, 2004), "Esperanto - manual de limba internațională" (Zagreba metodo A, 2003), "Esperanto" (Saul Osias, 1994) kaj "Rumana antologio" (1990).

- La 25-an de aprilo 2015 **Kanjo Kanev** el Galabovo (Bulgario), donacis al DEC la bildkarton "Saluton el Galabovo", sian Esperantan vizitkarton kaj

kelkajn gluetikedojn okaze de jubileoj de la loka societo kaj plastan saketon de la 57-a kongreso de BEA (Galabovo, 2005).

- La 25-an de aprilo 2015 **Georgi Litov** el Bulgario donacis al DEC insignon de la 35-a IFEF-kongreso (Slančev Brjag, 1984).

- En Ruse (Bulgario), dum la 67-a kongreso de BEA, por la kolekto de DEC estis aĉetita "Sinonima vortaro de Esperanto" (Emil Dimov, 2015).

- En Vroclavo (Pollando), la 16-an de majo 2015, dum la 3-a Festivalo de Esperantaj kantoj, **Halina Kuropatnicka-Salamon** donacis al la sekretario de DEC 30 ekzemplerojn de sia poemaro "Gutoj de renkontoj".

- Samtage kaj samloke **Elżbieta Karczewska** el Bjalistoko (Pollando) donacis al DEC la infanlibron "Perdiĝis la kobajo".

- La 2-an de junio 2015 la sekretario de DEC per aŭtomobilo transportis el Zagrebo la donacon de **Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA)**, kiu konsitas el: 150 ekz. de "El Popola Ĉinio", 113 ekz. de "Jugoslavia fervojisto", 127 ekz. de "Internacia fervojisto", 10 ekz. de "Ovo", 10 kajeroj de "Esperanto-revuo", 10 ekz. de "Heroldo de Esperanto", 1 ekz. de "Fine" (SEK Zagrebo), 3 ekz. de "Bilten SEH-a", 1 ekz. de "Sennaciulo", 1 ekz. de "Starto", 11 ekz. de "Esperanto" (Beograd), 25 ekz. de "ZELano", 14 ekz. de "Voĉo", 7 ekz. de "Voĉo de handikapuloj", 43 ekz. de "Tempo", 1 ekz. de "Velo", 4 ekz. der "Perspektivo" (NEM), 1



ekz. de "Dana fervojisto", 1 ekz. de "Homo kaj kosmo", 2 ekz. de "Kongresa bulteno de la 35-a IFEF-kongreso" (Oostende), 1 ekz. de "Esperanto en Skotlando", 6 ekz. de "Spiritisma Esperanto-informilo", 1 ekz. de "Itala fervojisto", 1 ekz. de "Etnismo", 6 ekz. de "Kajeroj de Jugoslavia Esperanto-instituto", 2 ekz. de "Israela Esperantisto", 1 ekz. de "Semajna bulteno", 1 ekz. de "Budapeŝta informilo", 1 ekz. de "Nia verda informilo", 1 ekz. de "Fervoja esperantisto", 1 ekz. de "Svisa esperantisto", bindita kolekto de "Ulekso" (n-roj 50-56, jarkolekto 1957), 16 ekz. de "Bulteno" (organo de la Aŭstria fervojista Esperanto-federacio), 1 ekz. de "Bulteno de la 34-a IFEF-kongreso, Balatonfüred", 1 ekz. de "La suda stelo", 6 ekz. de "Gramatikaj ekzemploj - gramatiĉki primjeri, Ila parto, 2. dio" (Velimir Lukež, 1984), Dua informilo de la 35-a IJK, Austerlitz, "Fervojista Esperanto Societo Zagreb 1954-1984" (3 ekz.), prospekto "57a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso, Braşov - Rumanio", invitulo "100-jara jubileo de Esperanto en Zagreb kaj Kroatio", manuskripto de "Internacia konvencio pri fervojaj vartransportoj (CIM), 4 ekz. de "Kroatia poezio", bildlibro "La sep reĝidoj", reklamilo "38a Kongreso de IFEF" de la turisma agentejo "Feroturist", Kantareto de la 38a IFEF-kongreso, "Esperanto - sto godina u službi čovečanstva", "Neke činjenice o međunarodnom jeziku Esperanto" (Novi Sad, 1978), "Por la paco III" (1965), "Kongresa bulteno - inforilo de la 23-a kongreso de JEL", "Esperanto junulkurso", Jarlibro de UEA 2001, "Analfabeto kaj butono" (2 ekz.), "Ridu per Esperanto", "Naciismo - studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj" (E. Lanti, SAT, 1930), "Triesto ... al kiu?", "Esperanto jezik i pokret A" (1981), "La fino" (Folke Bernadotte), "Monto de l' virino" (Hanojo, 1959), reklamilo

"Poziv u školu esperanta na Goču od 20. do 30. 8. 1984.", "La Sankta Meso en la Solenaĵo de Pentekosto" (diservo dum la 38-a Kongreso se IFEF" (Skopje, 1986, Franjo Gruič), "La firma konekso trans la Sundon" (fakprelego en la 50-a IFEF-kongreso, Aalborg, 1998), "Esperanto na Jugoslovenskim železnicama" (Gvozden Sredić, 1985), "Kantareto" de la 37-a IFEF-kongreso (Vejle, 1985), monografioj "Osijek" (kun dediĉo al FES Zagreb el 1985), "Skopje" (kun dediĉo al FES Zagreb el 1986), "Podravka" (kun dediĉo al FES Zagreb el 1989), turisma prospekto "Zagreb 1094-1994" (14 ekz.), Rezolucio de la Kvina Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado (Ateno, 1979), Kovrilo de "Hisotrio de Jugoslavia Fervojista Esperanto-Movado" (Beograd, aprilo 1980), "Đakovo i njegova okolica" (Zbornik muzeja Đakovštine, sv. 3 (kun la traduko en la germana de Franjo Gruič).

- La 29-an de junio 2015 **Dušan Adnadj** el Borovo, sendis al DEC originalajn leterojn de Oton Pancer (1), Ivo Lapenna (1), Antonije Sekelj (1), Paul Neergaard (1), "The British Esperanto Association" (1), Renato Guiere (1), Radoslav V. Sandić (1), Dragan Dimitrijević Ruschitty (1), adresaron de partoprenintoj de la 2-a Balkana Esperanto-Kongreso (Ateno, 1984), unu artikolon pri Esperanto el "Svet" (Beograd, 2012), 4 dokumentojn pri registriĝo de "Voĉo de handikapuloj" en la registro de publikaj informiloj de Jugoslavio kaj Kroatio kaj leteron de Komunumo Vinkovci (1983) pri atribuo de la Premio de liberigo de Vukovar al Esperanto-societo "Fratoj Ribar" el Borovo.

- La 1-an de julio 2015 **Ljubica Sedmak** el Pomer (Kroatio), sendis por arkivigo sian originalan Esperantlingvan manuskripton pri matematiko, titolitan "Nombroj" (160 paĝojn).

PUBLIKE PRI ESPERANTO

- La 29-an de majo 2015, la oficiala **portalo de Urbo Đurđevac** publikigis la artikolon "*Predstavljen esperantski prijevod Vlaka u snijegu*": <http://djurdjevac.hr/dogadanja-u-gradu/predstavljen-esperantski-prijeod-vlaka-u-snijegu/>


- La 29-an de majo 2015, la portalo "**Roster town**" publikigis la artikolon "*Esperantski prijevod Vlaka u snijegu*": http://djurdjevac.eu/index.php?option=com_content&view=article&id=5807:esperantski-prijevod-qlvaka-u-snijegu&catid=62:kultura&Itemid=304

- La 1-an de junio 2015 la **retejo de Elementa Lernejo Mate Lovraka en Veliki Grđevac** publikigis raporton pri kulturtagoj de Mato Lovrak, en kiu estas menciita ankaŭ libroprezento de "La trajno en la neĝo" en Esperanto.

- La 8-an de junio 2015 "**Podravski list**" n-ro 669, paĝo 13, publikigis la artikolon "*Pleadin preveo na esperanto roman Vlak u snijegu*".

- En la televida kanalo **HRT 1**, la 8-an de junio 2015 estis elsendita prilingva programo "*Jezik za svakoga*", en kiu preskaŭ 4 minutoj estis dediĉitaj al Esperanto, kiun prezentis profesoro Velimir Piškorec el la Filozofia fakultato de Zagreb.

La **68-a Kongreso de IFEF** okazos de la 21-a ĝis la 28-a de majo 2016 proksime al **Varna** (Bulgario), kaj la postkongreso en **Veliko Târnovo**. Pliajn detalojn bonvolu peti ĉe: Veselka Kamburova: hg_68ifk@abv.bg



Okaze de la **Nacia Festivalo de la Libro "AXIS LIBRI"**, Galați (Galaco), de la 27-a de majo ĝis la 1-a de junio 2015, Distrikta Biblioteko Galaco nomata V. A. Urechia kaj Distrikta Muzeo - Olt organizis prelegojn kaj ekspozicion titolitan: "**Literatura română tradusă în Esperanto**" (Rumana literaturo tradukita en lingvo Esperanto). Prelegis pri tio s-roj univ. docento Jozefo E. Nagy, muzeografo d-ro Doru Neagu, inĝ. Marin Voichin kaj biblioteka vicdirektorino, s-ino Letiția Buruiiană. Post la prelegoj, la ĉeestintoj ricevis informojn pri Esperanto kaj la esperantista movado.

La ekspozicio kun libroj el rumana literaturo tradukitaj en Esperanton estis aranĝita de muzeografo de la Distrikta Muzeo - Olt, doktoro Neagu Doru en Biblioteko V. A. Urechia.

(Marian Voichin)

La **26-a MKR (Mont-Kabana Renkontiĝo)** okazos ĉi-jare inter la 1-a kaj 4-a de oktobro en **Veli Lošinj** (insulo Lošinj). La MKR-ejo estos la loka Junulargastejo, kiu ofertas 50 litojn en 2- ĝis 5-litaj ĉambroj kun etaĝaj necesejoj kaj duŝejoj. Ekskurso gvidos la MKR-anojn sur la plej altan pinton de la insulo (Oroščica, 588 m), de kie videblas la tuta norda Adriatiko, kaj laŭ tre bela apudmara migradvojo ili atingos belajn kaj malofte vizitatajn partojn de la insula marbordo. La aliĝilo troviĝas ĉe: <http://keja.hr/mkr/aligxu-almkr/>

En februaro 2015, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio anoncis konkurson por la posteno de Ĝenerala Direktoro, celante trovi posteulon por Osmo Buller post lia emeritiĝo en la unuaj monatoj de 2016. La limdato por kandidatiĝoj estis la 31-a de majo. Ĝis la limdato venis ses kandidatiĝoj. Post pluretape diskutado, la Estraro decidis inviti tri el la kandidatoj al persona intervjuo en Lillo, la 24-an de julio, unu tagon antaŭ la komenco de la 100-a Universala Kongreso. La tri kandidatoj invititaj al intervjuo estas **Konrad Andrzejuk** el Pollando, **Veronika Poór** el Hungario kaj **Nikola Rašić** el Nederlando.

Kroata Ministerio pri kulturo draste reduktis subvenciojn al Esperanto-organizaĵoj. El la ministeriaj raportoj ni ekscias, ke por Esperanto en 2015 estis atribuitaj: **2.200 kunaĵoj al Kroata Esperanto-Ligo (KEL)** por prezenti la prelegon "Cent jaroj de kroata literaturo en tradukoj" dum la 100-a UK en Lillo, **6.320 kunaĵoj al Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE)** por partopreni la 81-an kongreson de blindaj esperantistoj en San Benedetto del Tronto

(Italio) kaj **5.000 kunaĵoj al Kroata Esperanto-Ligo (KEL)** por eldonado de "Tempo". Rifuzita estis la peto de **Kroata Esperantista Unuiĝo (KEU)** por financi la prelegon "Kroata heredaĵo en la UNESKO-listo de monda heredaĵo" en Triesto kaj Romo dum majo kaj junio ĉi-jare.


La 24-an de majo 2015, en la restoracio "Ŝenoa" en Bjelovar okazis **jarkunveno de Bjelovara Esperantista Societo**, kiu akceptis du bazajn dokumentojn: la Statuton kaj la Strategian planon. La nova Statuto estas adaptita al la postuloj de la nova Leĝo pri asocioj, kaj la Strategia plano rilatas la jarojn 2016-2018. Per unuminuta silento la ĉeestintoj omaĝis siajn forpasintajn samideanojn, aparte s-anon Dragutin Kranželić, kiu forpasis la 15-an de majo. Estis prezentitaj labor- kaj financa raportoj por 2014, kiuj estis unuanime akceptitaj. Intertempe la bjelovara Oficejo de ŝtata administrado konfirmis la novan statuton de Bjelovara Esperantista Societo, kio signifas, ke DEB adaptis sian funkciadon al la nova Leĝo pri asocioj.

La 7-an de junio **Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE)** okazigis sian jarkunvenon en Rijeka, en la ejo de Esperanto-societo Rijeka.

La **7-a Boatado sur la rivero Kupa** okazos inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto 2015. Informiĝu ĉe: esperanto.sisak@gmail.com


Renkontiĝo de Esperantaj verkistoj okazos de la 11-a ĝis la 13-a de septembro 2015 en Hraščina. Informiĝu ĉe: esperanto@zg.t-com.hr

ALEKSANDAR SAŠA KOCIAN (1930-2015)



La 24-an de marto 2015 forpasis unu el la plej gravaj osijekaj esperantistoj, la veterano *Aleksandar Saša Kocian*, kiu per sia multjara servado al Esperanto-societo "Liberiga stelo" nemezureble ŝuldigis la movadon en Osijek. Li naskiĝis la 5-an de oktobro 1930 en Osijek. Inter 1953 kaj sia pensiigo en 1993 li laboris en la urba firmao "Unikom". Li esperantistiĝis en 1950 en Zagrebo ĉe Lucija Borčić. Preskaŭ seninterrompe ekde 1971 (kiam li heredis en la sekretaria funkcio Franjo-n Smerdel), ĝis antaŭ nelonge li sekretariis en "Liberiga stelo". Li estis multjara fidela membro de Universala Esperanto-Asocio, ĝia loka delegito kaj partorpeninto de 14 Universalaj Kongresoj. Li estis ĉiam bonanima, servopreta kaj senplenda aktivulo, kies vivoverko estas kroatigo de la romano "Sklavoj de dio" pere de Esperanto (2011). La tradukon li eldonis proprakoste kaj dediĉis al sia edzino. Granda parto de liaj Esperantaj materialoj estas konservata en Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), inkluzive de 1600 diapozitivaj pri lia privata vivo. La materialojn li transdonis al DEC en 2006, 2007 kaj 2008.


*Dekstre:
Titolpaĝo de
"Sklavoj de
dio" en la
kroata traduko
de Kocian kaj
diplomo de UEA
por multjara
seninterrompa
membrego.*



DRAGUTIN KRANŽELIĆ (1924-2015)

La 15-an de majo 2015 mortis la plej aĝa membro de Bjelovara Esperantista Societo, doktoro pri medicino *Dragutin Kranželić*. Li naskiĝis en Bjelovar la 1-an de novembro 1924. Pri medicino li diplomigis en la Medicina fakultato de Zagrebo en 1952, specialiĝis pri epidemiologio en 1962 kaj kiel epidemiologo laboris dum 28 jaroj en Bjelovar. Dum sia junaĝo li estis sukcesa sportisto (naĝanto), aktivulo kaj prezidanto de la organizaĵo de Ruĝa kruco en Bjelovar. Li laboris kiel tribunala konsultanto kaj tribunalmedicina nekropsiisto. Dum la epidemioj de infanparalizo (1961-1962) kaj variolo (1972) li gvidis amasan vakcinadon. Li estis preleganto en la Lernejo por flegistinoj en Bjelovar dum 15 jaroj. Li pensiĝis en 1990.

Pri Esperanto li okupiĝis pasive ekde 1950-aj jaroj, dum ekzisto de iama Esperanto-societo Bjelovar. Li partoprenis la 9-an kongreson de kroataj esperantistoj en Bjelovar, kaj kiam refondiĝis Bjelovara Esperantista Societo, li fariĝis ĝia membro, sed pro la malbona sanstato li ne povis aktive partopreni en la societaj aktivecoj.



LITERATURA MONDO DE ZDRAVKO SELEŠ

 Mihaela Cik

Post libroprezentoj en diversaj okazoj kaj en diversaj urboj, la 15-an de aprilo 2015 en la Tribuno de Asocio de kroataj verkistoj (Društvo hrvatskih književnika) en Zagrebo okazis prezento de la du lastaj libroj de Zdravko Seleš. Tiu prezento montris sin kiel bona eblico por resumado de la tuta ĝisnuna literatura agado de Zdravko Seleš. Ĉar la trilingva libro *Snovi i sjene / Senje i tenje / Songoj kaj ombroj* konsistas plejparte el elektitaj poemoj kaj kelkaj eseoj kaj tradukoj, oni povas konsideri ĝin beletra parto de lia kreado. Aliflanke, sian studeman, sed tamen same tiel bonege komponitan parton de sia verkaro la aŭtoro prezentis en la kroatingva libro *Galović kaj la lastaj aferoj* por kiu li elektis nur siajn eseojn. Tial la du libroj kune prezentas la tutan literaturan mondon de Zdravko Seleš.



Pri *Songoj kaj ombroj* oni jam parolis kaj skribis kaj nun indas diri ion pri *Galović kaj la lastaj aferoj*, kiu aperis pasintjare en la eldono de Podravina-prigorja filio de la Asocio de kroataj verkistoj. Gravaj mencii, ke la libro aperis ĝuste en 2014, la jaro en kiu ni rememoras la grandan kroatan verkiston Fran Galović okaze de lia 100-a mortodatreveno. La libro konsistas el eseoj elektitaj el pli ol 30-jara literatura agado de la aŭtoro. La subtitolo de la libro sugestas, ke la eseoj temas pri Podravino kaj, vere, la plej granda parto temas pri podravinaj verkistoj, la kajkava lingvo kaj sentoj pri la domicilio. Fran Galović, liaj verkoj kaj lia influo, tiuj tre gravaj temoj

por la aŭtoro, trovis sian lokon en la lasta parto de la libro. Sed en *Galović kaj la lastaj aferoj* troviĝas ankaŭ diversaj temoj, interalie, Esperantaj. Nome, Seleš tradukis en la kroatan tri eseojn ("Sepulitejo por Danilo Kiš", "Onklo Maroje: Komedio pri mishomoj kaj veraj homoj" kaj "Nova realismo de Mikaelo Bronŝtejn aŭ eta traktato pri leganto") originale verkitajn en Esperanto. Krome, la aŭtoro skribis pri la libro *Svjeto i sjena / Lumo kaj ombro* de Ivan Golub kaj pri la kroata verkisto kaj esperantisto Đuro Rašan.

Konklude oni povas diri, ke la libro *Galović kaj la lastaj aferoj* ankoraŭfoje provas la subtilan propagandon de Esperanto en la verkoj de Zdravko Seleš.

RENKONTE AL ILEI-FEST

Inter la 11-a kaj 13-a de majo, invitita de kvar kroataj Esperanto-societoj, Bjelovaron vizitis *Radojica Petrović*, estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), por diskuti la temojn de la festivalo ILEI-FEST, kiun ILEI planas kunorganizati kun kvar kroataj societoj. La festivalo devus okazi inter la 6-a kaj 13-a de aŭgusto 2016 en Bjelovar. La lokaj organizantoj jam ricevis subtenon de urbaj kaj departementaj instancoj, kaj la vizito de Radojica Petrović estis uzita por fiksi planojn kaj elekti Lokan Festivalan Komitaton (LFK). La komuna kunsido okazis en la Hotelo "Central" la 11-an de majo.

